ISSN 0023-3692

# kontakto




trimonata revuo de tejo
tutmonda esperantista junulara organizo

numero 67 (1980:3)

# kontakto

REDAKTOROJ:
**Ĝim-Kuŝino (gaste), Dario Besseghini, Karl Pov**

**ADRESO DE LA REDAKCIO:** 'Kontakto', Dario Besseghini, Casella Postale 210, I-56100 Pisa, Italio.

**ADRESO DE LA ADMINISTREJO:** Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel. (010) 36 15 39; pĉk. 37 89 64 de ĝiroficejo Den Haag.

**ANONCTARIFO:** 120 gld. por tuta paĝo, 70 gld. por duona paĝo, 40 gld. por kvarona paĝo. Anoncetoj (sen kadro) po 0,25 gld. por ĉiu vorto (aŭ po unu internacia respondkupono por tri vortoj).

# enhavo

| | | |
|---|---|---|
| Enkonduko | ĝk | 2 |
| USONO: La libereco sukcesi aŭ malsukcesi | Thomas A. Goldman | 3 |
| SOVETA UNIO: Justo kaj sekureco | Dmitrij Perevalov | 6 |
| JUGOSLAVIO: Ĉu ideala mezo? | Radenko Milošević | 8 |
| Ekonomiaj kaj aliaj sistemoj kaj ... malsato | Jan Koszmaluk | 10 |
| Triamondaj bezonoj kaj unuamondaj proponoj | Elisabeth Schwarzer | 10 |
| Kompari laŭ kiuj kriterioj? | András Lukács | 12 |
| Kiel distingi inter ekonomiaj sistemoj? | Leif Gunnar Karlsson | 14 |
| Al novaj strukturoj: La kooperativa sektoro en kapitalisma lando | M.T. Liouville | 15 |
| Ĉu lekto por komencantoj? (Dialektoj kaj aliaj lektoj en la internacia lingvo, parto tri) | Renato Corsetti | 16 |
| La terura tentaklo (parto tri) | ß. | 17 |
| Inter tradicio kaj moderno: Junularo debatas en Nairobi | Ian Tarrant | 18 |

# enkonduko

Ni ĉiuj konscias pri tio, ke en nia mondo kunekzistas diversaj ekonomiaj sistemoj. Tiu fakto provizas materialon por sennombraj (kaj ofte ŝajnas al ni — senfinaj) diskutoj kaj disputoj. En la lernejoj ni ĉie ĉefe lernas pri la propra sistemo. Se oni entute prezentas al ni la aliajn sistemojn, tio kutime okazas kun la aldona klarigo, ke 'tiuj aliaj' estas malaktualaj, troigaj, historie eksaj, malnaturaj aŭ malhumanaj — evidente malsuperaj kompare al la nia.

La internacia turismo ĉiujare pliampleksiĝas, kaj certe restado en landoj kun alispeca ekonomia sistemo estas valora sperto. Per la propraj okuloj oni ricevas multe pli profundajn impresojn ol per legado de sekaj libroj. Tamen dubindas, ĉu kelktaga vizito al alia lando ebligas ĝisfundan komprenon pri ties ekonomia sistemo, kaj ĉiuokaze la plej grandaj interŝanĝoj de turistoj okazas ĝuste inter landoj kun la *samaj aŭ tre similaj* sistemoj.

Kion fari? La redakcio de *Kontakto* decidis dediĉi unu numeron al la temo: "Komparo de Ekonomiaj Sistemoj". Oni prezentu al la legantaro kiel eble plej koncize la ĉefajn trajtojn de pluraj ekonomiaj sistemoj, allasu kelkajn artikolojn, kiuj analizos kaj donos fonon, kaj la legantaro mem komparu. Komparu kiucele? Ne por elekti 'la plej bonan' (eĉ la grandiozaj streboj kaj sinstreĉoj de via redakcio ne sukcesis produkti 18-paĝan lernilon, kiu transformos vin en plenkapablan ekonomikiston post duhora legado) — sed por pli profunde ekkoni la konceptojn kaj demandojn, kiuj multloke donas brulaĵon al la flamoj de nia eksplodema mondo.

Konforme al la plano, ĉi tiu numero enhavas i.a. po unu artikolon pri tiuj sistemoj troviĝantaj en Soveta Unio, Jugoslavio kaj Usono (vidu la klasifikan skemon de Karlsson sur paĝo 14). Ilin verkis homoj, kiuj loĝas en la koncernaj landoj kaj, aldone, havas pli ol supraĵan scion pri la ekonomiko.

Aŭtoroj estis kontaktitaj en decembro kaj januaro, interkonsentoj estis atingitaj, kaj ĉiu promesis verki samlongan artikolon kun la jena enhava strukturo: **1** ĝenerala prezento de la koncerna sistemo, **2** skizo pri ĝiaj diferencoj kompare al la aliaj, **3** priskribo de ĝi el la vidpunkto de tipa civitano, kiu bezonas ekz. terpomojn, ĉemizon, loĝejon, kuraciston.

Inter tiuj tri ĉefartikoloj rimarkeblas konsiderindaj diferencoj de stilo kaj de aliro al la problemaro. Krom la supre menciitaj tri gvidlinioj, la redaktoro nenion ordonis al la verkontoj, nek ion ajn malpermesis. Sekve, la rimarkeblaj malsamaĵoj povas esti mem instruaj por la leganto.

La ceteraj artikoloj formas buntan bukedon: du pritraktas triamondajn temojn, unu priskribas la ekonomiajn flankojn de kooperativoj, kaj du analizas la komparan agon mem — eventualajn kriteriojn, metodojn kaj danĝerojn. Leginte ĉi lastajn du, oni emas sin demandi, ĉu entute *eblas* sencohave kompari ekonomiajn sistemojn!

En fako tiel malofte priverkata en Esperanto, neeviteblas iom da terminologia konfuzo. Vi vidos jen kaj jen diversajn terminojn por la sama fenomeno, kaj difinitan terminon uzatan diverssence en diversaj lokoj. La redaktoro decidis tamen lasi netuŝita la originalan terminologion de la unuopaj artikoloj, anstataŭ iom arbitre kaj diktatore unuecigi ĉion.

Vi rimarkos bedaŭrindan mankon de artikoloj el Azio kaj Afriko. Pri Afriko vi eble komprenos: la maldenso de esperantistoj tie tre malfaciligas la taskon. Sed Azio? Nu, la redaktoro klopodis. Estis senditaj al diversaj landoj pluraj verk-petoj kaj -petegoj, sed vane ĝis nun. Same okazis rilate al eventuala artikolo pri la kibuca sistemo en Israelo. Kaj ĉio ĉi malgraŭ la bonvolaj penoj de surlokaj kunlaborantoj klopodantaj instigi siajn samlandanojn al fruktodona verkado. Nenio estas perfekta. Ĉi tiel almenaŭ restos adekvataj demandoj por iama posta kompletiga numero samtema.

Do legu plue — pri la via, kaj aparte pri 'tiuj aliaj'. Laŭ la ĝisnunaj indikoj povus esti, ke ni restos sufiĉe longe kun nia ekonomia diverseco. Tre indas, ke ni ekkonu pli bone la ekonomian pejzaĝon de niaj samplanedanoj. ĝk




# La libereco sukcesi aŭ malsukcesi:

## La ekonomia sistemo de Usono

de Thomas A. Goldman, Usono

La esenca trajto de la usona ekonomia sistemo estas, ke ĉian ekonomian agadon faras sendependaj entreprenoj konkurante. Fundamenta konsekvenco de tiu trajto estas, ke tutekonomia planado ne ekzistas. La adaptiĝo de la ekonomio al eventuale ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj dependas de la fleksebleco kaj adaptiĝemo (libervola aŭ kontraŭvola) de la entreprenoj. Unu el la plej gravaj formoj de adaptiĝo — plej ofte kontraŭvola — estas bankroto kaj sekva malapero de la entrepreno. Ĉiutage, do, novaj entreprenoj fondiĝas, malnovaj malaperas, kaj la tuto de la ekzistantaj entreprenoj strebas plenumi la bezonojn de la konsumantoj.

Ĉiu entrepreno apartenas laŭleĝe al la persono aŭ personoj, kiuj disponigis al la entrepreno ties kapitalon. Do la ekonomia agado dependas, almenaŭ principe, de la 'kapitalistoj'. La ekonomian sistemon de Usono oni do nomas kapitalismo. Rimarku ke, se entrepreno bankrotas, la bonhavon oni disdividas inter la kreditoroj, kaj por la personoj kiuj disponigis la kapitalon restas nenio, do ilia kapitalo estas perdita. Tio signifas, ke la kapitalisto estas, laŭprincipe, tiu, kiu riskas sian monon en ekonomia agado. La kontraŭflanko estas, ke la kapitalisto ricevas la profiton kiam la entrepreno sukcesas.

En pli frua periodo, la tipan entreprenon posedis kaj estris nur unu sola homo, malofte du; nur en specialaj situacioj la kapitalon de entrepreno kontribuis pluraj personoj. Dum la 19a jarcento, la ekonomia strukturo ŝanĝiĝis. Dum la lastaj cent jaroj, la tipa entrepreno en Usono estas akcia kompanio (en Usono nomata 'korporacio'). La kapitalon de korporacio kontribuas tiuj, kiuj aĉetas akciojn. Ne malmultaj korporacioj havas milojn da akciposedantoj. Ili kompreneble ne povas direkti la ĉiutagan funkciadon de la entrepreno, do ili elektas direkcian konsilion. La konsilianoj siavice elektas la estrajn funkciulojn de la korporacio, kiuj devas direkti ĝian ĉiutagan funkciadon. Tiuj rilatoj estas fundamentaj kiel determinantoj de la strukturo de la usona ekonomia sistemo. La estraj funkciuloj de la grandaj korporacioj havas grandan potencon; iliaj ĉiutagaj decidoj forte influas la evoluan tendencon de la ekonomio. La konsilianoj posedas, siavice, la kapablon grave influi la internan politikon de la korporacio, kaj tiel la evoluadon de la ekonomio. La akciposedantoj, kvankam ili estas rigardataj kiel laŭleĝaj posedantoj de la korporacio, estas dutavole distancigitaj de la direktado de la entrepreno. Se unu akciposedanto, aŭ kelkaj kune, havas aŭ malrekte regas signifan porcion de la akcioj, tio ebligas signifan influadon sur la direktado de la entrepreno. Alie, la akciposedanto estas nenio pli ol investanto.

Daŭra kaj notinda tendenco en la ekonomia strukturo de Usono estas la pligrandiĝo de la entreprenoj per kunfandiĝoj. Dum longa tempo, la celo de tiaj pligrandiĝoj estis monopolo aŭ reganta pozicio en *unu* industrio. Dum la lastaj jardekoj, entreprenoj en *malsamaj* industrioj kunfandiĝadas kun la celo minimumigi konjunkturajn riskojn. La sekvoj de tiaj ŝanĝoj en la ekonomia strukturo estas multegaj — tro multnombraj por diskuto ĉi tie. Simile grava — kaj eĉ pli komplika — estas la plimultiĝo de plurnaciaj entreprenoj, kun filioj en multaj landoj; tiel kreiĝas kapitalisma ekonomio ne nur internacia sed supernacia kaj eksternacia, eĉ sennacia, por tiel diri.

Paralele al la kreskado de la individuaj entreprenoj kaj la plimultiĝo de grandegaj korporacioj, kreskis kaj pligraviĝis la financa sektoro de la ekonomio. Fundamenta elemento de la financa sektoro estas komercaj bankoj, kiuj akceptas deponojn de la publiko ĝenerala kaj pruntas monon al entreprenoj. En multaj landoj, la nombro de komercaj bankoj estas malgranda; ĉiu banko funkcias tutlande per branĉoficejoj en multaj lokoj. En Usono, ĉiu ŝtato malpermesas la funkciadon de bankoj el aliaj ŝtatoj en sia teritorio, do la nombro de bankoj estas tre granda. Ĉar komercaj bankoj tenas nur frakciajn rezervojn de kontanto rilate al siaj deponoj, ili kapablas pruntedoni pluroble pli ol ili ricevas de la deponantoj. Sekve, la mona stoko kreskas aŭ malkreskas laŭ la kresko aŭ malkresko de bankaj pruntoj. La Centra Banko (nomita, en Usono, la Federacia Komisiono pri Rezervoj) celas determini la monan stokon per diversaj rimedoj, esence per fiksado de procentoj, ĉar la grando de la mona stoko influas la konjunkturon.

Krom la komercaj bankoj, troviĝas multaj financaj entreprenoj kiuj makleras aŭ komercas per valorpaperoj kaj tiel disponigas monon al entreprenoj je pli longa daŭro ol banka prunto. La bilborsoj ebligas kontinuan komercadon per valorpaperoj. Pro sia regado de la financaj rimedoj, financaj entreprenoj ludas eksterproporcian rolon en la evoluado de la ekonomio.

Grava kaj tipa aspekto de kapitalisma ekonomio estas la konjunkturo kaj ĝia variado. La ĵus skizitan ekonomian strukturon oni povas nomi 'atomisma'. Grava konsekvenco estas alta nivelo de interdependeco. Ke la vendoj de unu entrepreno varias, estas tute natura afero; ke la

vendoj de unu industrio varias, estas ankaŭ komprenebla afero. Se tamen la vendoj de ĉiuj industrioj, aŭ eĉ nur de pluraj gravaj industrioj, kune varias, la konsekvencoj disvastiĝas tra la tuta ekonomio, pro la interdependo kiu rezultas de la atomisma strukturo. Tion oni nomas konjunktura variado.

Pri konjunktura variado vigle debatas la profesoroj de ekonomiko, sed la statistikoj estas nedisputeblaj. La konjunkturo ne ĉiam plialtiĝas, sed periodon de plialtiĝo sekvas periodo de malaltiĝo. En periodo de konjunktura plialtiĝo, la produkto de ĉiuj industrioj (kaj do la nacia produkto) kreskas ĝis maksimumo, kiun oni difinas kiel la industrian kapaciton. Senlaboreco malkreskas; ĉiaj enspezoj pligrandiĝas, kaj elspezoj — do mendoj — samtempe. Dum konjunktura plialtiĝo, la stoko de mono kutime kreskas pro kresko de la kvanto de bankaj pruntoj, sub regado de la mona politiko de la Centra Banko.

Pro unu aŭ alia kialo (kaj jen la granda temo por disputado), alta konjunkturo iam komencas malaltiĝi. Vendoj de diversaj industrioj, kaj ilia produktado, malkreskas. Ĉiaj enspezoj malpligrandiĝas, senlaboreco kreskas. Konsekvence vendoj malkreskas eĉ pli. Tiel, la interdependeco funkcias kiel daŭriganta forto, kiu puŝas la nivelon de ekonomia agado ĉiam pli alten aŭ malalten kiam ĝi komencas iri en unu aŭ alia direkto.

Ĉar ĉiuj klopodoj forigi konjunkturajn fluktuadojn per ekonomia politiko, aŭ per nura regado de la mona stoko, ĝis nun malsukcesis, la registaro celas minimumigi la malagrablajn simptomojn. Unu el la plej signifaj rimedoj estas la sociala asekuro, per kio senlaborulo ricevas parton de sia antaŭa salajro dum serĉado de nova posteno. Rilate socialan asekuron, aliaj kapitalismaj landoj antaŭiris Usonon, almenaŭ en la komenco; hodiaŭ, tamen, usonanoj rajtas ricevi enspezojn ne nur pro senlaboreco sed ankaŭ pro malsano, pro kripliĝo kaj, ĉe tre malriĉaj familioj, por nutrado de infanoj. Per la sama sistemo, emerito ricevas pension en maljunaĝo.

Plian protekton donas la sindikatoj. Malpermesitaj dum longa tempo, ili kreskis tiom dum la nuna jarcento, ke multaj fariĝis grandegaj kaj potencaj organizaĵoj. Ili ne nur intertraktas pri salajroj kaj laborkondiĉoj, sed ankaŭ provizas plian asekuron kontraŭ senlaboreco, malsaniĝo kaj kripliĝo, kaj por pensiigi emeritojn.

Restas priparoli la rolon de la registaro en la ekonomia sistemo, aŭ pli precize, de la diversaj registaroj, ĉar ĉiu el la kvindek ŝtatoj, kaj eĉ ĉiu komunumo, difinas sian propran ekonomian politikon, pli-malpli sendepende. Multaj profesoroj asertas, ke en kapitalisma sistemo la registaro devas nenion fari por iel influi la ekonomion, sed devas resti tute neŭtrala (t.e., seninflua). Nur la juĝistaro devas stabiligi, por tiel diri, la ekonomion, punante krimojn, ekzemple fraŭdojn, kaj decidante disputojn inter civitanoj, ankaŭ komercajn. Fakte, tamen, la usonaj registaroj, de la 18a jarcento ĝis hodiaŭ, neniam atentis tiajn akademiajn vidpunktojn, sed ĉiam influis la ekonomian evoluadon per diversaj rimedoj. Oni protektis enlandajn industriojn per doganoj, subvenciis deziratajn agadojn, impostis nedeziratajn, kaj limigis preskaŭ ĉiajn ekonomiajn agadojn per regularoj. Antaŭ kvindek jaroj, la federacia registaro eltrovis novan rimedon, la registaran korporacion; tio estas akcia kompanio kies akciojn ĉiujn posedas iu registara instanco. Hodiaŭ, registaraj korporacioj funkciigas fervojojn, produktas elektron, vendas asekuron, komercas per hipotekoj kaj tiel plu.


La komunumoj plej rekte direktas la ekonomian agadon en siaj teritorioj, kiel ili jam ekde la komenco faras. Ili enzonigas la terpecojn per specifaj agadoj, postulas permesilon por tre multaj entreprenoj, reguligas ekonomiajn agadojn, kaj ne malofte funkciigas entreprenojn, precipe publikutilajn.

En la 18a jarcento, la registaroj, precipe la federacia, estis tre malgrandaj en proporcio al la tuta ekonomio; cetere, grandega plimulto de la enloĝantaro okupiĝis pri agrikulturo, kaj granda parto de la cetero okupiĝis malrekte pri agrikulturo — komercis per agrikulturaj varoj kaj simile. Hodiaŭ, la registaroj konsistigas per si mem ne malgrandan porcion de la tuta ekonomio, dungas signifan parton de la laborantoj, en- kaj el-spezas grandan parton de la nacia produkto, kaj provizas vastan kvanton da pure registaraj servoj rekte al la civitanaro. Sekve, la decidoj, kiujn faras la registaroj, nepre influas la ekonomion, eĉ se ili volus resti tute neŭtralaj — kaj ili tion ja ne volas. Ekonomia politiko jam ne plu povas manki al iu ajn nivelo de registaro. Fakte, la registaraj oficuloj, kaj administraciaj kaj leĝofaraj, serioze kaj longe konsideras la ekonomiajn konsekvencojn de siaj decidoj.

## Aspektoj de la ĉiutaga vivo

Karakteriza trajto de la usona ekonomio estas la libereco de la konsumanto elekti inter diversaj eblecoj. La registaro ne diktas kion aĉeti, kie loĝi, kion aŭ kiom manĝi. La vendejoj disponigas sortimenton de plej diversaj varoj, je tre diversaj prezoj.

**Pro la komerca konkurencado, la reklamarto, per i.a. televido, ludas gravan rolon en la usona ekonomia vivo.**




Tipa manifestiĝo de tiu trajto estas aĉeto de vestaĵo, ekz. ĉemizo aŭ jupo. La konkurado sin esprimas, eble pli frape en Usono ol en aliaj landoj, per la reklamado. En gazetoj kaj ĵurnaloj la leganto vidas reklamojn de fabrikantoj pri siaj ĉemizoj aŭ jupoj. En ĵurnalo, vendejoj reklamas produktojn, kiujn ili vendas, de diversaj fabrikantoj, kaj ofte anoncas rabatojn por allogi aĉetantojn. La aĉetonto devas elekti vendejon (aŭ viziti plurajn), kaj tiam elekti inter la fabrikmarkoj, kaj inter la diversaj stiloj, koloroj kaj kvalitoj (je diversaj prezoj) de la varoj, kun aŭ sen helpo de vendisto. Tiuj aĉetantoj, kiuj estas plej atentemaj pri nuancoj de stilo, koloro kaj ŝtofo, ne malofte vizitas plurajn vendejojn por trovi unu vestaĵon. Farinte elekton, la aĉetanto aŭ pagas kontante aŭ prokrastas pagon per uzo de kredito, ĉu de konto ĉe vendejo, ĉu per kredita karto.

Por aĉeti manĝaĵon, la procedo estas simila, sed eble iom pli simpla. Por enpakitaj manĝaĵoj, la diferencoj de la ĉi-supra priskribo estas minimumaj: fabrikantoj reklamas, produktoj diferenciĝas, eble nur nuance. Se temas pri kilogramo da terpomoj, tiel ne estas. Ekzistas kompreneble pluraj specoj de terpomoj, sed konkuradon inter produktantoj oni apenaŭ trovas (sed ja trovas!). Des pli

konkuras la vendejoj, precipe per rabatoj, metante grandajn reklamojn en la ĵurnalojn. La aĉetonto elektas vendejon, ofte la plej proksiman sed foje preferatan aŭ pli malaltprezan. En multaj landoj, vendejoj estas specialigitaj, kaj oni iras de buĉisto al legomisto al spicisto al drogisto, kaj tiel plu. En Usono, unu vendejo kutime vendas ĉiajn manĝaĵojn, ofte ankaŭ diversajn dommastrumaĵojn; plej ofte ĉio estas memserva. Do la kliento elektas la plej bonkvalitajn terpomojn el amaso en granda ujo, ĝis la bezonata kvanto, kaj pagas ilin (kun eventualaj aliaj aĉetoj) ĉe kasejo.

Ankaŭ por akiri loĝejon, la procedo estas simila, kvankam ĉiu loĝejo estas kompreneble unikaĵo. Ĉu por lui ĉu por aĉeti loĝejon, oni traserĉas reklamojn en ĵurnalo por trovi taŭgajn, iras rigardi tiujn, elektas unu, kaj penas interkonsenti kun la posedanto, eble konkure kun aliaj serĉantoj. En kazo de malsukceso, oni ripetas la procedon. Post interkonsentiĝo, la procedo estas sufiĉe rigida, ĉar luon aŭ aĉeton de loĝejo, precipe aĉeton, regas tradiciaj leĝoj el mezepoka Anglujo.

Sanprizorgo estas eĉ pli simpla afero, ĉar kuracistoj ne konkuras rekte kaj ne reklamas. Oni elektas kuraciston aŭ laŭ rekomendo aŭ tutsimple laŭ proksimeco. Konsideru edzparon al kiu ĵus naskiĝis la unua infano; ili bezonas infankuraciston. Eble la edzino elektos tiun, kiun konsultis ŝia patrino; lin ŝi konas de infanaĝo, kaj reciproke. Se li, maljuniĝinta, ne plu akceptas pacientojn, aŭ ŝi jam transloĝiĝis al alia urbo, ŝi petos amikojn, familianojn aŭ kolegojn pri rekomendo. Elektinte unu, ŝi telefone petas rendevuon kaj iras al la konsultejo. Tiel oni akiras sanprizorgon; dum la lastaj jardekoj, la plimulto de enloĝantoj akiris medicinan asekuron kiu pagas la kostojn de sanprizorgo, kutime je 80 %. La paciento pagas 20 %. Kutime, la asekura kompanio permesas liberan elekton de kuracisto, de hospitalo ktp.

La procedo por akiri laborpostenon iel similas tiun por akiri loĝejon; en ambaŭ la konkurado estas iugrade duflanka. En ĵurnaloj oni trovas multajn reklamojn kaj por loĝejoj kaj por postenoj. La reklamantoj havas, ĉu malplenan loĝejon, ĉu malplenan postenon, kaj estos sendube tre malkontentaj se tiu aŭ tiu ĉi restos longan tempon malplena. Por serĉanto, multaj estas tute maltaŭgaj, kaj necesas elekti taŭgan; eble tiu serĉo malsukcesos kaj oni atendos morgaŭan ĵurnalon kun pliaj reklamoj. Trovinte taŭgan postenon (aŭ loĝejon), oni konkuras kun aliaj serĉantoj. Ĉiuj anoncas sin, ricevas intervjuon, kaj tiam la entrepreno elektas unu personon (por ĉiu posteno), supozeble la plej kompetentan. Se temas pri speciala kompetenteco, de metiisto aŭ profesiulo ekzemple, ofte pluraj entreprenoj devas konkuri por akiri la plej kompetentan por sia posteno.

Akiro de vojaĝeblo tre similas ordinaran aĉeton. Se oni ne vojaĝas per privata aŭtomobilo, necesas elekti transportan rimedon — aviadilon, fervojon aŭ aŭtobuson. Transportaj entreprenoj konkuras kiel vendejoj, sed per kromservoj pli ofte ol per rabatoj, ĉar la registaro reguligas transportprezojn. Vojaĝonto devas ankaŭ decidi ĉu mendi hotelon (aŭ alian loĝejon) antaŭ foriro, ĉu serĉi post alveno.

### Kiel ĝi diferencas de la aliaj?


La plej fundamenta trajto, kiu diferencigas la usonan ekonomian sistemon de aliaj, verŝajne estas, ke ĉiu entrepreno apartenas al individuaj privatuloj; alivorte, la rimedoj de produktado estas en privataj manoj. Tio esence distingas kapitalismajn sistemojn de ĉiaj socialismaj sistemoj, kaj de kolektivismaj sistemoj ĝenerale. La multiĝo de grandegaj akciaj kompanioj kun miloj da akciposedantoj ne senvalidigas tiun kontraston, sed plifortigas ĝin. Ju pli la posedado estas apartigata de estrado, des pli la posedo fariĝas pure privata afero.

La dua fundamenta trajto estas la konkurado, ne tiom pro si mem kiom pro la sekvoj de la konkurado. Tre signifa sekvo estas la ekzisto de profitoj kaj perdoj (aŭ malprofitoj). De tio devenas aliaj kontrastoj kaj ekstremoj — sukceso kaj malsukceso, grandaj profitoj kaj bankrotoj, riĉeco kaj malriĉeco. Aliaj sistemoj forigas aŭ minimumigas tiajn kontrastojn.

Unu sekvo de la konkurado estas la manko de tutekonomia planado aŭ kunordigo. Tio kontrastas kun planitaj ekonomiaj sistemoj, kaj evidentiĝas en la konjunkturaj variadoj kiuj ne malofte malekvilibrigas la ekonomian vivon. La kontraŭflanko de tio, kaj plua aspekto de la konkurado, estas fleksebleco kaj adaptiĝemo de la ekonomia agado kaj evoluado. La kapablo de la produktantoj kaj komercistoj respondi al eĉ tre rapide ŝanĝiĝantaj bezonoj aŭ deziroj de konsumantoj estas sendube impona. Oni devas memori, ke konkurado inkluzivas prezan konkuradon, kiu ne nur provizas varojn al konsumantoj malmultekoste, sed plifortigas la adaptiĝemon. Se varoj restas nevenditaj, kial ajn, ĉu pro tro granda kvanto por la mendo, ĉu pro kvalitaj mankoj, vendejoj rabatas la prezojn por forigi la varojn kiel eble plej baldaŭ. Varojn, kiuj ne estas vendataj, oni baldaŭ ĉesas produkti. Ĝenerale do, la konsumanto trovas tiajn varojn, kiajn li deziras.

La usona ekonomia sistemo diferencas de aliaj ankaŭ pro la rolo kaj sinteno de la registaroj. La registaro ne celas *rekte* influi la ekonomian agadon aŭ la ekonomian evoluadon. Tio certe kontrastas kun ĉiaj planitaj ekonomioj, ĉar plano postulas ian rektan influon al la ekonomia agado. En Usono, registaro ellaboras ekonomian politikon, precipe en rilato al konjunktura variado, sed ankaŭ en rilato al la ekonomia evoluado kaj kresko ĝenerale. Per malrektaj rimedoj, do, la registaro penas efektivigi la ellaboritan ekonomian politikon. Oni povas, certe, kontrastigi tiun sintenon de la usonaj registaroj kun la koncepto de pure neŭtrala registaro, kiu neniel influas la ekonomion. Tia registaro estus malfacile trovebla en la hodiaŭa mondo, kvankam la koncepto ŝajnas ludi gravan rolon, kaj en la ekonomia teorio kaj en la politikaj debatoj en Usono. Pli valida kontrasto, kiel dirite, estas kun registaroj kies influo al la ekonomio estas rekta anstataŭ malrekta.

En Usono, ekzistas speco de libereco, almenaŭ en la ekonomia tereno, nome la libereco peni, konkuri kaj sukcesi aŭ malsukcesi. Oni devas, kompreneble, taksi la valoron de tia libereco en rilato al la manko de egaleco en la ekonomia sfero, kiu do difinas la limojn de libereco. Tia libereco estas tamen efektiva. Multaj observantoj jam konkludis, ke la multiĝo de grandaj korporacioj fakte forigis la eblecojn, kiuj subtenis tian ekonomian liberecon. Sed en la nuna epoko de elektroniko kaj komputiloj, ne malmultaj inĝenieroj, matematikistoj kaj iom kleraj komercistoj, komence malriĉaj, sukcese konkuris kontraŭ aliaj entreprenoj, eĉ grandegaj, kaj fariĝis tre riĉaj. Multaj konkurantoj fakte malsukcesis kaj bankrotis, do oni povas preferi malpli da tia libereco kaj iom pli da sekureco. Ekonomia libereco tiuspeca estas ĉiukaze persista trajto de la usona sistemo.



# Justo kaj sekureco: La ekonomia sistemo de Soveta Unio

de Dmitrij Perevalov, Soveta Unio

La ĉi-numera temo postulas seriozan kaj specialan pristudon. Sed konsiderante, ke la plejparto de la legantoj ne estas ekonomiistoj, mi ne profundiĝos en specialajn sferojn de ekonomio kaj nur skize montros kelkajn ĉefajn specifaĵojn de la ekonomia sistemo en Soveta Unio.

Antaŭ ĉio necesas memorigi, ke la ekonomia sistemo en Sovetio estas unu el la variaĵoj de socialisma ekonomio ĝenerale, evoluanta laŭ la ekonomiaj leĝoj de socialismo — la unua stadio de komunisma sociekonomia sistemo, postsekvanta kaj anstataŭanta la kapitalisman sistemon. Do antaŭ ol kompari la ekonomiajn sistemojn de apartaj landoj (Sovetio, Usono ktp.), necesas kompari tiujn du sistemojn.


## Dinamiko de kapitalismo/socialismo

Rigardante la marksisman teorion pri la kapitalismo, ni vidas, ke en ties supera kaj lasta stadio — monopola kapitalismo, aŭ imperiismo — la produktado kaj distribuado koncentriĝas en la manojn de grandaj monopolistoj. Libera konkurenco preskaŭ plene malaperas, la monopolistoj diktas prezojn kaj ofte, anstataŭ plibonigi produktadon, ili simple plialtigas prezojn por ricevi superprofiton. Tio malhelpas al plua evoluo de produktivaj fortoj. Kaj — malgraŭ nuntempaj scienc-teknikaj revolucioj, kiuj donas ian puŝon al ekonomia evoluo, la karaktero de la kapitalismo esence ne ŝanĝiĝas — ĉiam parton de la plusvaloro ricevas la mastro de produktiloj. Laŭ la teorio, okazas tamen ŝanĝo: tiu parto pligrandiĝas kaj la profitoj de kapitalistoj plialtiĝas pli rapide ol la salajroj de laboristoj. Akriĝas la antagonismoj inter produktivaj fortoj kaj jam malnoviĝintaj produktadaj interrilatoj, inter alta nivelo de sociigo de produktado kaj la privata formo de alproprigo de la rezultoj de laboro.

Tiun antagonismon nuligas revolucia vojo. Socialisma revolucio transdonas la ĉefajn ilojn de produktado en la manojn de la tuta popolo. Por produktivaj fortoj malfermiĝas vojo al plua evoluo, plialtiĝas labor-produktiveco. La rezultoj de laboro estas juste distribuataj inter ĉiuj laboruloj. Tutpopola ekonomio disvolviĝas laŭ planoj. Malaperas ekonomiaj krizoj kaj senlaboreco. Ekspluatado de homo fare de homo ĉesas ekzisti. Kreiĝas kondiĉoj por ĉiuflanka evoluo de la individuo.

La celoj de socialisma ŝtato estas ĉiam pli plena kontentigo de la materialaj kaj spiritaj bezonoj de la homo. En socialismo regas la regulo: 'De ĉiu — laŭ kapabloj; al ĉiu — laŭ laboro,' kaj poste, en komunisma socio, tio ŝanĝiĝas al la slogano: 'De ĉiu — laŭ kapabloj; al ĉiu — laŭ bezonoj.'

Jen estas skiza skemo pri la evoluo de la kapitalismo ĝis socialisma socio laŭ marksisma teorio. Certe, tiu evoluo en ĉiuj landoj efektiviĝas koincide kun ties konkretaj kondiĉoj kaj estas tre varia. V.I. Lenin diris: 'Ĉiuj nacioj venos al socialismo, sed ĉiu siamaniere....' La praktiko indikas lian pravecon.



Kiel socialisma ŝtato, Soveta Unio celas ĉiam pli plene kontentigi la materialajn kaj spiritajn bezonojn de la homo.

## La historia fono


Socialisma revolucio okazis en Rusio dum la Unua Mondmilito, kiu pliakrigis la antagonismojn inter la popolamasoj kaj la regantaj klasoj. Kreiĝis socipolitika krizo, kiam la 'popolamasoj ne plu povis vivi kiel antaŭe, kaj la regantaj rondoj ne plu povis regi kiel antaŭe.' Tuj post la konkero de politika potenco kaj starigo de ĝia formo — diktaturo de la proletaro — la laborista klaso unuiĝe kun la kamparanaro komencis efektivigi sian ekonomian politikon. La grandaj monopolaj entreprenoj estis naciigitaj, ankaŭ la tuta tereno — sed tuj disdonita al la kamparanoj por ĉiama kaj senpaga uzo.

Post la enlanda milito la soveta ŝtato plene okupiĝis pri ekonomia konstruado. Unu el la grandiozaj planoj estis la elektrizo de la tuta lando — la fama plano GOELRO. Por atingi altevoluintan ekonomion kun moderna industrio kaj altproduktiva agrikulturo, estis necesa multjara transira periodo. Tiutempe ekzistis kvin sociekonomiaj sektoroj: 1 socialisma (naciigitaj grandaj industriaj kaj

agrikulturaj entreprenoj); **2** ŝtatkapitalisma (precipe miksitaj ŝtataj-privataj entreprenoj); **3** kapitalisma (privataj mezaj kaj malgrandaj entreprenoj); **4** farmoj kun et-vara produktado (precipe kamparanoj vendantaj siajn produktojn); **5** patriarkeca (natura, senvara produktado de kamparanoj ne vendantaj siajn produktojn). Kaj tiu lasta, estante postsigno de feŭdismo, okupis relative grandan parton de la farmoj. Estante la malplej produktivaj, tiuj farmoj nur malhelpis al la ekonomia evoluo. Kiel substrekis Lenin, Rusio suferis plej multe ne pro la evoluo de kapitalismo, sed male, pro manko de ties evoluo. En tiu situacio evoluigi sektoron de malgranda produktado kaj konduki ĝin al formo de granda socia produktado eblis nur per kooperigo. Kaj tiun kooperigon popaŝe, de postrestintaj farmoj ĝis la kolektivaj mastrumoj (kolĥozoj), oni efektivigis komence de la tridekaj jaroj.

Tiuj jaroj signis rapidan evoluon ankaŭ de la industrio, precipe de la peza industrio, kiu permesis liveri agrikulturajn produktojn per maŝinoj. Kun rapida ĉiuflanka evoluo de la ekonomio, plialtiĝis la vivnivelo de la popolo, kaj malaperis la senlaboreco. Tiuj atingoj des pli mirigas se oni konsideras, ke antaŭ la revolucio Rusio estis unu el la plej mizeraj landoj en la mondo, kaj ke post la revolucio diversaj potencaj ŝtatoj efektivigis ekonomian blokadon kontraŭ Soveta Unio. Krome, la centraj regionoj devis multon fordoni por helpi al la pli rapida evoluo de la aliaj respublikoj, kies popoloj estis en malalta nivelo de evoluo pro koloniisma ekspluatado fare de la cara reĝimo.

La socipolitika sistemo de Soveta Unio plene montris sian vivkapablon dum la Dua Mondmilito. La malamikaj trupoj plene detruis multajn urbojn kaj vilaĝojn, kaj kaŭzis perdon al la lando je tri duilionoj da rubloj. Dum longaj jaroj post la milito la sovetia popolo devis rekonstrui la ekonomion por atingi la antaŭmilitan nivelon.




**Lertajn fingrojn kaj akrajn okulojn havas la laboristinoj en ĉi tiu elektroteknika fabriko en Estonio.**

La rapideco de ekonomia evoluo en Soveta Unio ofte ŝajnis superi tiun de iuj kapitalismaj landoj.

Ĉu ni povas diri, ke tiu evoluo estis tute glata? Fakte ne. Multaj obstakloj, pri kelkaj el kiuj mi jam parolis, malhelpis al ĝi. Estis ankaŭ diversaj eraroj – sovetunianoj ja estis la unuaj, kiuj komencis konstrui la socialismon, kaj neniu povis montri al ili la vojon. Sed tiuj eraroj kaj difektoj tamen ne haltigis la antaŭenmarŝon, ĉar ili estis sufiĉe rapide korektitaj. Malnoviĝantaj formoj de produktado daŭre estas ŝanĝataj per pli progresemaj.

**'Ĉi tiujn vi ne plu bezonas.' La sanprizorgo en Soveta Unio estas senpaga.**



## Vivo de la popolo

Nun ni menciu kelkajn trajtojn de la sociekonomia vivo de la sovetunia popolo. Ĉiuj produktiloj apartenas al la tuta popolo. Same la profito estas distribuata cele al la interesoj de la tuta popolo. Laboruloj ricevas salajron laŭ la kvanto kaj kvalito de la laboro. La meza monata salajro estas proksimume 200 rubloj, kaj ĝi senĉese plialtiĝas. Ĉar la prezoj de bazaj varoj de konsumo ne altiĝas sed ofte eĉ malaltiĝas, la vivnivelo de la sovetia popolo ĉiam pliboniĝas. Lernado en mezaj kaj superaj lernejoj estas senpaga, kaj studentoj ricevas ŝtatan stipendion. Post fino de lernejo, laboro estas garantiita. Senprizorgo estas senpaga. Malsanulon oni kuracas senpage, ĉu hejme, ĉu en malsanulejo, kaj en malsanulejo oni ankaŭ nutras senpage. Krome, sindikatoj pagas al malsanulo, depende de laborlongeco, ĝis 100% de la normala salajro. Loĝejon oni ofte ricevas senpage de la ŝtato aŭ de la laborejo. Pago por loĝejo estas tre malalta – proksimume 5% de la salajro. En vilaĝoj multaj havas privatan domon. Ankaŭ en urboj eblas aĉeti aŭ konstrui privatan loĝejon, ofte per aniĝo al konstrukooperativo. La produktojn kaj varojn oni aĉetas en ŝtataj vendejoj aŭ bazaroj, kie siajn produktojn vendas privatuloj, precipe kamparanoj. Ŝtatan pension ricevas ĉiuj laboruloj: viroj post 60-jariĝo, virinoj post 55-jariĝo.

## Konkludoj

La socialismo celas la feliĉan vivon de ĉiuj homoj. Laŭ socialisma analizo, en kapitalismaj landoj la posedantoj de la produktrimedoj celas ĉefe la plej altan profiton, eĉ per uzo de malhonestaj kaj malhumanaj rimedoj. Tiel estas klarigebla la fenomeno, ke kapitalismaj entreprenoj preferas detrui superproduktaĵojn anstataŭ allasi malaltiĝon de prezoj. La militindustria komplekso en kapitalismaj landoj stimulas la vetarmadon je la kosto de la impostpagantoj, kies vivon minacas tiu sama vetarmado. Ankaŭ rilate la garantion de laboro la socialismo montras avantaĝojn super la kapitalismo.

En unu malgranda artikolo ne eblas montri detale la ekonomian sistemon de la unua socialisma lando. Mi pentris nur kelkajn ĉefajn trajtojn. Ĉiu pensema homo, kiu volas profunde kompreni la problemon, povas mem okupiĝi pri la pristudo kaj komparo inter la du sistemoj, socialismo kaj kapitalismo. Sed por havi objektivan bildon oni devas uzi ne nur okcidentajn materialojn sed ankaŭ fontojn el socialismaj landoj. Nur farinte tion, oni povos juĝi pri la respektivaj progresemo kaj kapablo por pluekzisto de la du sistemoj. ▪




# Ĉu ideala mezo?

## La ekonomia sistemo de Jugoslavio

**de Radenko Milošević, Jugoslavio**

*...Ĉu ekonomio estas rulkuko kiun ĉiu ekonomiisto povas ...pretigi laŭ sia propra 'recepto', aŭ ĉu ĝi estas jam fiksita rulkuko?...* —G. Tagliacozzo

Jugoslavio havas socialisman memmastruman sistemon kies ĉefaj karakterizoj estas socia posedo super produktrimedoj, memmastrumado kaj disdivido laŭ labor-kontribuo. Ekonomiaj rilatoj inter diversaj personoj okazas sub merkataj kondiĉoj kaj planado bazita sur sociaj kaj memmastrumaj interkonsentoj. Bazaj produktunuoj – entreprenoj, t.e. bazaj organizoj de asociita laboro – aperas kiel komunigaj varproduktantoj, kiuj produktas merkatan valoron (enspezaron) kaj per ĝia disdivido kaj uzo kontentigas ĉiujn siajn bezonojn – personajn, komunajn kaj ĝeneralajn.


La formado kaj disdivido de enspezaro okazas tra kvar etapoj: **1** perlaboro de la enspezaro, **2** disdivido de enspezaro, **3** disdivido de netenspezo kaj **4** disdivido de personaj enspezoj kaj komuna konsumo.

En la unua etapo, la malneta valoro (enspezaro) produktita en socio distribuiĝas per meĥanismo de prezoj inter entreprenoj, kiuj tiamaniere perlaboras sian enspezaron. Manieroj de perlaboro varias kaj enhavas karakterizojn jen de varekonomio (ekz. produktvendadon), jen de unuiĝaj formoj de asociita laboro – komunan perlaboron de enspezo laŭbaze de asociigo de laboro kaj aliaj monaj rimedoj kaj surbaze de libera interŝanĝo (por sociaj servoj).

En la dua etapo, la enspezaro, kiun entrepreno akiris, dividiĝas en unu parton, pri kies uzo decidas la produktunuo kaj ĝiaj laboristoj mem (netenspezon), kaj alian parton, pri kies uzo la entrepreno decidas kune kun aliaj instancoj en socia produktado. En tiu ĉi etapo fiksiĝas la grandeco de enspezo mem kiel diferenco inter perlaborita enspezaro (malneta) kaj produktokostoj plus amortizo. Oni devas speciale akcenti, ke la enspezaro en jugoslavia entrepreno estas komuna rezulto de ĉiuj laboristoj en tiu entrepreno, kaj ke pri ĝia disdivido (vidu la skemon) decidas la laboristoj mem laŭ sociaj reguloj kaj laŭ la respektivaj reguloj de la entrepreno. En la procedo de disdivido, oni asignas parton por komunaj bezonoj ekster la entrepreno: sociala asekuro, sanservoj, edukado, scienco, kulturo, sporto ktp. – kaj parton por ĝeneralaj sociaj bezonoj: nacia defendo, administrado, juĝistaro ktp. Tiu ĉi disdivido okazas kun laboristoj el organizoj de sociaj servoj kaj kun deputitaro de soci-politikaj komunumoj. Tiumaniere ĝi perdas iom post iom fiskan karakteron kaj iĝas ĉiam pli unika formo de libera interŝanĝo de laboro tra diversaj devoj kaj agadoj de la socio.

En la tria etapo, la enspezo de ĉiu entrepreno, post la

**SKEMO DE ENSPEZARA DISDIVIDO DE JUGOSLAVIA ENTREPRENO**




diversaj elspezoj (krudaĵkostoj, amortizo, elspezoj por registaro kaj komunaj servoj kiel kulturo, lernado, sano ktp.) estas bazo por laborista decido pri kondiĉoj kaj rezultoj kaj de ĉiu unuopa laboristo kaj de estonta disvolvo de la entrepreno. Tiel oni disdividas la enspezon por plivastigo de produktado (per investoj) kaj por salajraro kaj komuna laborista konsumado (loĝejoj, sporto, edukado ks.). Krom tia disdivido de enspezo entreprena je persona kaj komuna konsumo, oni rezervas parton de la neta enspezo. En la okazo ke la disdivido de enspezaj rimedoj malebligas la normalan reproduktprocedon de la entrepreno aŭ kontraŭstaras al laŭregulaj principoj de salajra disdivido laŭ la principo pri kontribuo al la laboro, la socio fiksas laŭleĝajn paŝojn.

En la kvara kaj fina etapo, laboristoj disdividas sian kaj personan kaj komunan konsumon el la enspezo proporcie al sia kontribuo al la laboro kaj al la prospero de la entrepreno. Al ĉiu laboristo apartenas el la enspezo de entrepreno, laŭ principoj de disdivido laŭ laboro kaj kresko de

produktiveco de lia kaj la suma socia laboro kaj kun principo de laborista solidareco, lia persona enspezo (salajro) laŭ la rezultoj de lia laboro kaj de lia kontribuo al la kresko de la entreprena enspezo per nuna kaj pasinta laboro. Laboristoj starigas mezurojn kaj regulojn por disdivido de tiu parto de la enspezo por persona kaj komuna elspezo-konsumo fiksita en t.n. memmastruma kontrakto, t.e. regularo.

Tian kernan procedon de perlaboro kaj disdivido de enspezo malneta ĉirkaŭas multaj gravaj elementoj: **1** la rilato inter planado kaj merkato, **2** la rolo de memmastrumaj interes-komunumoj (MIK-oj) por sociaj servoj, **3** la rolo de bankoj, la banka sistemo kaj la agado de la nacia banko en la komerca sfero, **4** la starigo de direktoro kaj gvidantaro de entrepreno fare de laborista konsilantaro (restas demando pri respondeco por produktrezultoj), **5** unuiĝo de samproduktaj entreprenoj en memmastrumajn organizojn de asociita laboro, kaj similaj organizoj en vertikalan produktan kunligon, **6** eksporto, praktike libera, kaj importo, kiu estas parte libera kaj parte reguligata en t.n. MIK-oj por eksterkomercaj rilatoj, kie per deputitoj entreprenaj kaj organizaj kun samtempaj mezuroj de ekonomia politiko asigniĝas importpermesoj, **7** liberaj agoj kun eksterlandaj partneroj por komunaj laboroj en- kaj ekster-lande, ktp.

## Laborpostenoj

Entreprenoj kaj MIK-oj pri edukado kune planas kaj la nombron kaj la strukturon de estonte necesaj postenoj. Kompreneble, pro merkataj kaŭzoj ĉiam restas ia rezervo, ĉar bona ekonomia kresko sekvigas pli grandan eblecon por novaj enposteniĝoj. Entreprenoj anoncas siajn bezonojn per la MIK por postenigado kaj per administraj kaj publikaj ĵurnaloj. Interesitoj propravole anonciĝas kaj laboristaj komisionoj el entreprenoj aŭ aliaj unuoj postenigas laŭ konataj reguloj novan laboriston. La MIK por postenigado, simile al borso, post multfoja rifuzo flanke de iu laboristo rilate ofertatajn postenojn ne devas por tiu plu serĉi postenon.

## Financado de lernado kaj studado

Financan subtenon oni ricevas plurmaniere: per studentaj fondaĵoj kiel krediton, kiel entreprenan stipendion, kaj per rekta entreprena pagado de lernejkostoj por ĝia laboristo. La studado mem estas senpaga, kaj kelkloke ankaŭ libroj estas senpagaj. Entreprenoj el la enspezo asignas kontribuon por diversnivela edukado, kaj ankaŭ el siaj netaj enspezoj ili povas el fondaĵo de komuna konsumo pagi por siaj laboristoj kaj studkostojn kaj kostojn de specialaj seminarioj por unu aŭ pluraj laboristoj. Stipendio el tia fondaĵo dependas de la ekonomia stato de la studenta familio, kaj aparte bonajn lernantojn aŭ studentojn oni parte aŭ tute liberigas de la devo redoni la prunteprenitan monon.

## Loĝejoj

Loĝejon oni aŭ povas ricevi por portempa uzado de entreprena komuna fondaĵo aŭ de interes-komunumo kiu prizorgas la plej grandan parton de sociaj loĝejoj, aŭ povas aĉeti, ĉu rekte ĉe konstruentrepreno, ĉu ĉe privata posedanto. En kazo de aĉeto, laboristo ricevas krediton ĉe sia entrepreno el la rimedoj por komuna konsumo (kie estas plej bonaj kondiĉoj — malpli alta rento kaj pli longa limdato por repago), aŭ ĉe banko, en kiu kazo ankaŭ la entrepreno povas fari por sia laboristo la necesan deponon. Disdivido de entreprena mono por solvado de loĝproblemoj baziĝas sur la internaj reguloj de la entrepreno, kiuj estas kunordigitaj kun la ĝeneralaj reguloj — precipe kun la Leĝo pri Asociita Laboro.

## Sanservoj

Ĉiu civitano de Jugoslavio ĝuas senpagan sanprizorgon. Institucioj kaj unuoj pri sanigado ricevas monon el la kontribuoj de laborunuoj el ilia enspezo kaj per rekta kontribuado de laboristoj el iliaj malnetaj personaj enspezoj (vidu la skemon). Kuracistaj vizitoj estas senpagaj, sed ne kuraciloj, krom medikamentoj por infanoj. Kontrolon pri sano ĉiu laborunuo kaj organizo povas pagi mem el siaj komunkonsumaj rimedoj. Tio nomiĝas 'libera interŝanĝo de laboro' kaj signifas rektan kontakton inter organizo, kiu bezonas tian servon, kaj organizo, kiu ĝin donas. Ili interkonsentas pri la kostoj, amplekso kaj enhavo de la sanservoj.



**La plej grava elemento de la jugoslavia (kaj ĉiu alia) ekonomia sistemo: la homo. Ĉi tiu estas vendisto de mansakoj. (Foto: Ivica Špoljarec.)**

## Bazaj problemoj

La ĉefa manko aŭ malforteco de la jugoslavia soci-ekonomia sistemo estas nesufiĉa konsekvenceco ĉe kunmetado de la sistemo. La premisoj kaj fundamentoj estas bone fiksitaj, sed ili realiĝas nekonsekvence en konkretaj solvoj de unuopaj sistemeroj.

Unue, la sistemo apogiĝas sur la homo kaj lia kreemo, sed la rolo de tiu homo kaj ties kreaj kapabloj ne sufiĉe rolas en la diversaj sistemsolvoj.

Due, la sistemo apogiĝas sur memmastrumado, sed ties realaj fortoj estas ankoraŭ grandparte subpremitaj, tiel ke ĝi ne povas laŭbezone disvolvi kreadon, iniciatemon kaj agemon. Samtempe memmastrumado ne portas tian partoprenon en ekonomia riskado kaj respondeco, kiu respondus al ĝiaj rolo kaj loko en la socio.

Trie, la sistemo dependas de tre specifa merkato-plana meĥanismo, sed ne estas disvolvitaj adekvataj metodoj de memmastruma planado. La merkato estas grandparte subpremita, tiel ke ĝi ne povas ludi sian veran rolon.

La jugoslavia soci-ekonomia sistemo funkcius pli efike se la homo, ĝia apogilo, ricevus plenan rolon kaj signifon en ĉiuj produktprocedoj, distribuprocedoj kaj sociaj rilatoj. En gvidado kaj decidado pri sociaj kaj ekonomiaj agoj, la homo ankoraŭ ne havas superan kaj senperan direktan rolon; tio manifestiĝas precipe en nesufiĉe ekonomia mastrumado kaj uzado de produktiloj.

# Ekonomiaj kaj aliaj sistemoj kaj... malsato



**de Jan Koszmaluk, Pollando**

Kio estas por vi malsato? Ĉu vi, kiu komencas legi tiun ĉi artikolon, iam ajn malsatis? Feliĉe mi ne scias kio estas malsatado. Mi malsatas, kiam mi forgesas aĉeti ion por manĝi aŭ kiam post diboĉado momente ekmankas al mi mono. Pri alia, vera malsato mi ekscias de la ĉiam pli kaj pli oftaj alarmaj informoj el radio, televido aŭ gazetaro. Laŭ tiuj informoj mi povas diveni, ke ĉar al mi estis destinite naskiĝi en la t.n. 'riĉa nordo', mi ne devas zorgi pri manĝaĵo timante malsatadon. Samtempe mi divenas, ke devas ekzisti ankaŭ la 'malriĉa sudo'.

Jes, brave. Vi estas sata, vi penege ne devas prizorgi la vivtenon, kaj do vi povas klare pensi kaj okupiĝi pri tiuspecaj problemoj. Kaj tiuj problemoj fariĝas vere urĝaj se pri ili okupiĝas jam politikistoj, ekonomiistoj kaj aliaj istoj. La bazaj konceptoj devenas el Ĉinio, el la tempo de prezidanto Maŭ Zedong. Grave kontribuis al konsciiĝo tutmonda pri tiuj problemoj la raportoj de la 'Klubo de Romo'. Mi rekomendas al la interesitoj trafoliumi tiujn raportojn: *La limoj de kreskado* de D.H. Meadows, *La homaro ĉe turnopunkto* de M. Mesarović kaj E. Pestel, kaj *Por nova ekonomia ordo* de J. Tinbergen k.a.

Nuntempe pli ol kvarcent milionoj da homoj malsatas kaj la sama nombro nur parte satiĝas. Do al ĉirkaŭ unu miliardo mankas nutraĵo. Ĉiu kvara homo malsatas. La problemo estas tutmonda kaj ne solvas ĝin helpo de unuopuloj. Individua helpo fordronas en oceano de bezonantoj. Nur grandskale organizita restrukturado de la internaciaj rilatoj povas doni realan ŝancon por savi la homaron. Ĉiu prokrasto postulos poste multe pli da elspezoj. Cetere la nocioj pri landoj 'evoluintaj' kaj 'neevoluintaj' estas misaj, ĉar laŭ ĝi la ekonomie riĉaj landoj estas pli valoraj ol la ceteraj. Estus pli honeste paroli pri landoj 'ekspluatantaj' kaj 'ekspluatataj'. Estas klare videblaj la naciaj egoismoj. La ekonomie potencaj ŝtatoj altrudas al novfonditaj ŝtatoj siajn kondiĉojn kaj diktas prezojn sur la monda merkato; tiuj ekonomie malfortaj ŝtatoj simple devas tion akceptadi. Ĉefministro de Jamaiko atestis: 'Laste Jamaiko devis produkti 3 500 tunojn da sukero por aĉeti unu traktoron el Kanado, kaj antaŭ nur kelkaj jaroj sufiĉis por la sama traktoro 680 tunoj da sukero. Ni postulas nenion krom honestaj prezoj....' Prezidanto de Kamerunio asertas, ke lia lando

**NI ESTAS MULTNACIA (entrepreno). PRI TIO MILIONOJ DA HOMOJ ĜOJAS. VW ESTAS PLI OL AŬTOMOBILOJ.**

**Kie oni konstruas VW, la homoj pli bone fartas. Ne nur ĉi-lande. La VW-kunlaborantoj en Brazilo, Meksikio kaj Sud-Afriko tion pruvas jam dum multaj jaroj. Malgraŭ diversaj vivmanieroj kaj leĝoj tie, tiu, kiu laboras ĉe VW, gajnas bone, kapablas realigi pli altan materialan vivnivelon, kaj estas en sekura stato rilate malsaniĝon kaj maljuniĝon.**

**La fakto, ke hodiaŭ en multaj landoj entreprenoj de VW ekzistas, originas en la deziro konstrui laŭeble malmultekoste kvalitajn aŭtomobilojn. Por atingi tion oni devas produkti amase. Kaj la bezonatan materialon oni devas aĉeti tie, kie ĝi estas havigebla plej favore....**

**Pli multaj homoj povis vivi pli bone. Pli multaj homoj povis aĉeti propran aŭtomobilon. VW povis produkti pli da aŭtoj.**

**Pro la internacia produktado VW kreis dekmilojn da laborlokoj kaj ne nur plimovebligis milionojn da homoj en multaj landoj, sed ankaŭ plikontentigis, pliriĉigis kaj plisendependigis ilin.**

(Parta traduko de anonco de la aŭtomobila entrepreno Volkswagen (VW) aperinta en la gazeto *Frankfurter Rundschau* la 10an de majo 1977.)

# kaj u

Ankaŭ al apudurba kabanaĉo venas televidaj bildoj pri 'la moderna vivo'. Kaj plaĉajn anoncojn, kia estas la ĉiapuda, ne nur germanaj entreprenoj publikigas. Unuavide ĉio ŝajnas esti en ordo. Grandaj firmaoj investas kaj konstruas produktejojn en landoj de la Tria Mondo. Aŭ temas pri komuna kunlabora projekto de firmaoj en la Tria Mondo kaj la eksterlanda konzerno. Ankaŭ oftas, ke eksterlandaj firmaoj nur alportas maŝinaron kaj teknologion aŭ la enlandaj entreprenoj nur utiligas la servojn pri produkt-gvidado de la konzerno.

Konjekteble, la agado de firmaoj el industrilandoj estas kaj tre bonvena kaj tre utila en landoj de la Tria Mondo. Tian starpunkton certe en pluraj landoj oni renkontas. Vidu Brazilon, kiu daŭre allogas eksterlandajn investantojn. Tiu ĉi lando eĉ jam estas t.n. 'transira lando' (do en la stadio inter evolu- kaj industri-lando).

dum nur kelkaj jaroj perdis multe pli pro malaltiĝo de la prezoj de kakao ol ĝi ricevis de la tuta ricevita helpo el la riĉaj landoj.

Ekzistas ankaŭ alia problemo. Temas pri la morala devo helpadi, ne nur pro humanismaj konvinkoj. Mi kuraĝas konstati, ke estas landoj, kies morala devo estas pli granda ol tiu de aliaj. Mi proponu nur unu ekzemplon: Hindujo — riĉega historio kaj kulturo. Hindujo havis tre priĵaluzindajn trezorojn. Bedaŭrinde mi diras 'havis', kaj ne 'havas'. Se la trezoroj de la antaŭaj jarcentoj restus ankoraŭ tie, ĉu la hindoj malsatus tiel hodiaŭ? Hindujo ne estas ja escepto. Ĉie, kie regis koloniismo, landoj estis malriĉigitaj. Ĉu la eksaj koloniestroj sentas sian devon? Sub la jugo de koloniismo la landoj perdis siajn trezorojn — rimedojn por sin sekurigi kontraŭ malsato. La plej riĉaj muzeoj pri malnovaj kulturoj troviĝas ne en landoj, kie naskiĝis tiuj kulturoj, sed en Nov-Jorko, Londono, Berlino kaj aliaj urbegoj. Hodiaŭ oni plu prirabas tiujn landojn de iliaj trezoroj, ĉar tie oni ne havas rimedojn por gardi tiujn trezorojn. Diversaj Unesko-rezolucioj gravas — surpapere. La ŝtelistoj tamen ricevadas belajn sumojn ĝuste de la muzeoj de la riĉaj privatuloj.

Sed kial la homoj malsatas? Ĉu pro manko de nutraĵoj? Nepre ne. Ĉiu homo povus esti sata se la nutraĵoj estus distribuataj juste. Ja ekzistas la rezervoj, sed la ekonomisistemoj prizorgas sian propran riĉaĵon kaj nenion disdonas senpage. Kaj la homo ne bezonas tiom multe da kalorioj por travivi. Se vi vivas aktive — laboras, dancas, kuras, lernas, ludas ktp., vi bezonas tri-kvar mil kaloriojn. Se vi estas rekordrompema sportisto aŭ simultana interpretisto, vi bezonas proksimume ses mil kaloriojn dum via fortostreĉo. Minimuma kvanto por travivi tagon estas 1500 kalorioj. Malpli signifas por la homo resti senmove por ne perdi tro da vivofortoj, almozpeti aŭ atendi la morton. En la plej multaj landoj, la ĉiutaga zorgo pri vivteno ensorbas la tutan energion de la homoj, igante ilin sentaŭgaj por pli perspektiva agado.

Unu miliardo da homoj malsatas kaj samtempe, dum ĉiu minuto, oni elspezas por armado milionon da dolaroj. Nura kvinono de la elspezoj, kiujn la potencoŝtatoj dediĉas por armado, plene sufiĉus por kovri ĉiujn kostojn por progresigo de la landoj ekonomie malfortaj. Diris papo Paŭlo 6a en sia enciklo 'Progreso de la popoloj': '...kaj do, ne la teknikaj kaj ekonomiaj malfacilaĵoj sed la moralaj kaj politikaj faras la ĉefan barilon por realigo de la progresprogramo....'

La nuntempan homon ĉiam akompanas la dubo: ĉu tiu progreso, kies aŭtoro estas la homo mem, kaŭzas ke la homa vivo sur Tero fariĝas pli homeca, pli digna? Ĉu la homo pro tiu teknika progreso fariĝas pli bona, pli matura spirite, pli respondeca kaj malfermita por la aliaj, precipe por la malpli fortaj kaj helpon bezonantaj? Ĉu en la homo, inter la homoj, inter socioj, nacioj, ŝtatoj, kreskas justeco, solidareco, komprenemo — aŭ ĉu male, kreskas la egoismo, la naciismo, la emo regi aliajn?

Ekzistas reala kaj jam sentebla danĝero, ke la homo, rapide strebanta al regado de la mondo, naturo kaj objektoj, perdas sian esencon kaj iĝas mem objekto de multflanka — ofte ne rekte komprenebla — manipulado fare de produktad-sistemoj, sociaj premoj aŭ amaskomunikiloj. Tio kapablas limigi la homon ĝis nura dimensio produktokonsumada. Ŝajnas ke ni ĉiuj fariĝas pli kaj pli konsciaj, ke ekspluatado de la Tero postulas ian pli racian kaj honestan planadon. Ja ni staras antaŭ la granda konflikto, inter tiuj, kiuj klopodas akiri eble plej grandan profiton, kaj tiuj, kiuj pagas per peza tributo da maljustaĵoj, suferoj kaj humiligoj. Ĉiuj estas homoj. ▪


# Triamondaj bezonoj nuamondaj proponoj

de Elisabeth Schwarzer, FR Germanio

Relative konate estas, ke en triamondaj landoj la ekonomio estas ne jam evoluinta kaj "laŭkapable oni helpu ties plifortiĝon". Kaj kian impreson oni ricevas pri la triamondaj ŝtatorganoj? Kiel en ĉiu lando, demokrate elektitaj politikistoj gvidas la ŝtataferojn cele al 'la bonfarto de la socio kaj de ĉiu enloĝanto' kaj prospero de la propra lando. Por atingi la duan celon prioritate multaj opinias, ke vole-nevole oni bezonas la enmiksiĝon de internaciaj konzernoj. Tamen, la esenca instigo por entreprenoj estas ne la plibonfartigo de la loka loĝantaro sed la plej taŭga utiligado de la kapitalo. Ĝi ebligu pligrandigon de la produktado kaj pli da profito.

Ekzemple, VW efike agas ĉar produktado de aŭtoj necesigas laborlokojn sed samtempe varbas ankaŭ en la Tria Mondo aĉetantojn por tiu varo. Aŭtomobilo jes povas esti taŭga, sed ĉu ĝi estas vere bezonata kaj pagebla fare de homo, kiu nur streĉe povas liveri materialan vivbazon por multnombra familio?

Samtempe evidentas, ke ne nepre ŝtatorganoj kapablas reprezenti la starpunkton de la plejparto de la socio. Ĝuste en landoj de la Tria Mondo, la diferencoj inter la diversaj sociaj grupoj estas ege grandaj. Plej multe ekzistas kamparanoj, kamparaj laboristoj, etkomercistoj kaj senlaboruloj. En Afriko la registaran aparaton formas ĉefe administraj kaj armeaj elitoj, kaj en Latinameriko aldoniĝas terposedantoj. Tiuj socigrupoj certe ankaŭ direktas la ekonomian evoluon.



Konklude, la aktiviĝo de multnaciaj kapitalismaj konzernoj en la Tria Mondo estas tentoplena fonto de investaĵoj, sed ĝia fina efikeco, kiom tio koncernas la ricevantan landon — dubindas. ▪



# Kompari laŭ kiuj kriterioj?

de András Lukács, Hungario

Ĝis hodiaŭ ne estas ellaboritaj la objektivaj kriterioj necesaj por taŭge kompari ekonomiajn sistemojn. La determinadon de tiaj kriterioj malhelpas la komplikeco kaj kompleksec o de ekonomiaj sistemoj kaj ankaŭ la fakto, ke fari tiajn komparojn ne estas en la interesoj de ĉiuj koncernuloj.

Ne eblas esplori iun ekonomian sistemon en si mem, sed nur ene de la tuta socia sistemo, kies nedisigebla, fundamenta parto ĝi estas. Necesas konsideri ankaŭ la historion de la koncerna lando, ĉar eblas, ke — ekzemple — en la ekzistantaj cirkonstancoj ĝia ekonomia sistemo plej taŭgas por plua evoluado kaj prosperado, sed pro jarcentoj da kolonia aŭ duonkolonia subpremado la nivelo de ĝia ekonomio estas ankoraŭ tre malalta. Oni ankaŭ ne preteratentu la internacian situacion: povas okazi, ke unu lando pro iu ekstera minaco devas elspezi por armado grandan monsumon, kaj samtempe alia lando havas la eblon elspezi preskaŭ nenion por militaj celoj. La geografiaj faktoroj same gravas, ĉar la klimato, la reliefo, la (mal)abundeco de naturaj riĉaĵoj ktp. fortege influas la ekonomian evoluon de la koncerna lando. Oni devas atenti ankaŭ la grandecon de la respektivaj landoj, ĉar estas malverŝajne, ke ekonomia sistemo, kiu estus perfekta por Andoro, same taŭgus por Usono.

Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj ĉi-sube mi provos listigi kelkajn kriteriojn, ĝenerale uzatajn por kompari ekonomiajn sistemojn.

## Proprieto de la produktiloj

La plej ofte menciata kriterio estas la proprieto de la produktiloj: ĉu la bazaj produktiloj estas sociaj — unuavice ŝtataj — aŭ privataj proprietaĵoj. Evidente tio ĉi ne povas esti la ununura kriterio de komparo, ĉar ekzistas grandaj diferencoj inter eĉ landoj kun similaj proprietrilatoj. La socia aŭ privata proprieto de la produktiloj estas nur rimedoj necesaj (sed tute ne sufiĉaj) por atingi pli-malpli determinitajn sociajn celojn. Sekve, por konstati, kiom efike funkcias iu ekonomia sistemo, bezonatas aliaj indikiloj.

## Nacia enspezaro

La plej ĝenerale — ofte eĉ ekskluzive — uzataj indikiloj estas la grandeco de la nacia enspezaro porkapa kaj ĝia kresko. La fidindecon de tiaspecaj komparoj oni povas dubi, i.a. pro la granda diverseco de naciaj valutoj kaj prezoj. Plue, tial ke la diversaj registaroj supozas, ke la kreskigo de la nacia enspezaro esence efikas ilian prestiĝon, forta estas la tendenco plialtigi la datumojn pri ties valoro. Koncerne ĉi demandon interesajn faktojn citas ekonomiisto András Bródy en la hungara revuo *Ekonomio*, n-ro 4/1979. Li skribas, ke laŭ oficialaj statistikoj en Usono dum la sesdek jaroj inter 1896 kaj 1955, la nacia enspezaro por ĉiu persono dekobliĝis. Tio signifus, ke en 1896 ĝi estis malpli ol 200 dolaroj. Laŭ sovetiaj oficialaj statistikoj dum la 60 jaroj inter 1917 kaj 1977 la nacia enspezaro de Sovetunio centobliĝis. Tiamaniere — se oni enkalkulas la kreskon de la loĝantaro kaj la nunan enspezaron porkapa — por 1917 oni ricevas la valoron de po 20 rubloj (je hodiaŭaj prezoj). Se tiuj ĉi datumoj konformus al la realo, la plimulto de la tiama usona kaj rusia loĝantaro malsatmortintus.

La nuna metodo de kalkulado de la nacia enspezaro havas ankaŭ aliajn seriozajn difektojn. La detruado de arbaro por produkti libraĉojn kaj gazetaĉojn, la etendado de asfalto sur la ĝis tiam belega pejzaĝo, la ĝenerala malpliboniĝo de la trafiko pro la cirkulado de troege da aŭtoj, la produktado de multaj malbonkvalitaj varoj anstataŭ malpli multaj sed vere bonkvalitaj — ĉio ĉi montriĝas kiel plialtiĝo de la nacia enspezaro. La samo okazas, se iu vane fosas, poste plenigas la fosaĵon kaj estas pagita por tio. (Do la nacia enspezaro ne evidentigas kiom da 'fosantoj' ekzistas en iu lando.) En la nacian enspezaron oni enkalkulas la produktadon de varoj senutilaj por la homa bonfarto, sed oni ne subtrahas de ĝi la damaĝon, kaŭzitan pro la malpurigado de la aero, akvo ktp.

Sekve, per tiu mezuro oni scias pri nek la bonfarto, riĉeco, utileco, vivkvalito, nek eĉ la ekonomia potenco. La fetiĉisma rilato de ŝtatoj al la nacia enspezaro kaj la strebado plialtigi ĝin per ĉiuj rimedoj povas konduki al katastrofo.

## Nacia havo, distribuo, elektro kaj estonteco

Por determini la ekonomian evoluintecon de iu lando, nepras konsideri ankaŭ la nacian havaĵon. Povas esti, ke la grandeco de la nacia enspezaro porkapa estas simila en du landoj, sed jam troviĝas pli da vojoj, konstruaĵoj ktp. en unu el ili ol en la alia. Tamen nuntempe haveblas tre malmulte da fidindaj datumoj por komparo de naciaj havoj.

Eblas kompari ankaŭ iujn naturajn indikilojn, kiel la konsumadon de elektroenergio aŭ la produktadon de ŝtalo por ĉiu kapo, sed tiuj ĉi indikiloj povas esti same erarigaj kiel la nacia enspezaro porkapa, pro similaj kaŭzoj.

Necesas scii ankaŭ la distribuon de la enspezoj kaj havoj ene de la koncernaj landoj, ĉar ne povas longdaŭre esti stabila ekonomia sistemo, kiu provizas malmultajn riĉulojn per luksaj senutilaĵoj dum la popolamasoj vivas mizerege.

Alia kriterio de komparo devas esti la planado de la estonteco far la socio. Nepras esplori ekzemple, ĉu la naturaj riĉaĵoj de la lando estas rabe ekspluatataj aŭ — kontraŭe — certigataj ankaŭ por la estontaj generacioj.

## Financaj faktoroj

La ekonomion de iu lando povas karakterizi ankaŭ la deprecado de valuto. Troa inflacio ofte kontribuas al la misfunkciado de la ekonomio. Tamen ankaŭ la perforta stabiligo de prezoj far la ŝtato povas konduki al seriozaj ekonomiaj problemoj. Tiukaze la prezoj ne plu spegulas la verajn kostojn de la produktado kaj tiel neniu plu scias kiun varon necesas pli ŝpari kaj kiun oni povas uzadi pli libere. Sekve estiĝas granda malŝparado kaj ekonomia kaoso. La neŝanĝeblo de prezoj povas rezultigi malplibonigon de la kvalito de varoj (nur tiamaniere la entreprenoj povas kovri la daŭre kreskantajn kostojn de la produktado) kaj disvastigon de la nigra merkato (pro la malekvilibriĝo de la ofertado kaj la postulado). Krome povas pligrandiĝi la socia malegaleco. (Estas evidente, ke riĉuloj ĝenerale konsumas pli ol malriĉuloj. Do se la ŝtato subvencias iujn varojn aŭ servojn, ĉefe la riĉuloj ĝuas tiujn subvenciojn — kvankam verŝajne ekzistas kelkaj gravaj esceptoj kiel edukado, sanaferoj ktp.)

## Senlaboreco kaj dungiteco

Necesas konsideri ankaŭ tion, kiugrade estas utiligataj la laborfortoj de la koncernaj landoj, kiel granda estas — interalie — la proporcio de senlaboreco al dungiteco. Tamen mezuri tion praktike ne eblas. Oficialaj statistikoj povas indiki la nombron de senlaboruloj, sed ne la nombron de dungitoj, farantaj senutilajn aŭ eĉ socie malutilajn laborojn. Ekzistas landoj, kie plena dungiteco estis atingita dank'al tio, ke la entreprenoj tenas superfluajn laboristojn. Kaj tiaspeca 'enfabrika' senlaboreco povas esti por la socio pli damaĝa kaj demoraliza ol la oficiale registrita senlaboreco.

## Direktado de laborejoj

Plua kriterio por komparo povas esti la sistemo de ekonomia direktado. Ekzemple, ĉu ĝi estas sufiĉe demokratia, senpera, ĉu ĝi ebligas al ĉiuj labori laŭ la kapabloj, vere kontribui al la direktado de la koncerna laborejo (urbo, lando), ktp. Malfacile kontesteblas, ke en tiu lando, kie amasoj povas partopreni la direktadon de la ekonomio, kie ĉiu laborulo sentas sin interesata en la pluevoluigo de la socio, tie la ekonomio funkcias pli efike ol tie, kie la direktado estas privilegio de iu mallarĝa tavolo. Sed kvante karakterizi la direktad-sistemon apenaŭ eblas.

## Kiel fartas la homo?

La plej grava konsistaĵo de iu ajn ekonomia sistemo estas la homo. Pro tio, ankaŭ la indikiloj karakterizantaj la homojn en iu lando estas gravaj kriterioj por kompari ekonomiajn sistemojn.

Unu el la plej gravaj tiaspecaj indikiloj estas la grado de edukiteco kaj klereco. Oni povas kompari ekzemple la proporcion de analfabetoj aŭ aliajn datumojn pri la instruiteco de la koncernaj popoloj. Tamen tia komparo povas esti ege erariga, ĉar ĝi ĝenerale preteratentas la kvaliton de la instruado. Homo ricevinta altlernejan diplomon en lando A ja povas scii malpli ol homo fininta nur mezlernejon en lando B. (Ni eĉ ne parolu pri tiaspecaj diversecoj ene de la sama lando.) Kaŭzas pluajn malfacilaĵojn la fakto, ke apenaŭ troveblas indikilo, kiu montrus la efikecon de la morala edukado. Ja ne estas indiferente, ĉu oni uzas la akiritan scion por servi al la homaro aŭ por ekstermi kiel eble plej grandajn homamasojn. (La loĝantaro de nazia Germanio estis inter la plej kleraj en la mondo....)

Alia grava — kaj ĝenerale precize publikigita — indikilo estas la aĝspecifa atendebla averaĝa vivdaŭro. En bone, moderne funkcianta ekonomia sistemo ĝi ne povas esti malalta.

Ankaŭ la datumoj pri malsanoj indikas ion pri la ekonomia sistemo. Oni tamen tre singarde komparu tiajn datumojn. Ekzemple la praktika determinado de neŭrozuloj kaj psikozuloj ege varias de lando al lando.

Same, la nombro de sinmortigoj povas aludi al iuj ekonomiaj misfunkciadoj. Tamen estas tre malfacile determini la proporcion de sinmortigintoj, ĉar ofte eĉ ne eblas distingi sinmortigon disde akcidento.

La proporcio de krimado estas alia indikilo. Sed leviĝas la demando, kiom granda estas la diferenco inter la nombro de la malkaŝitaj — kaj publikigitaj en oficialaj statistikoj — kaj tiu de la efektive faritaj krimoj.


En multaj landoj prosperas la t.n. neleĝa (ĝi estas nomata ankaŭ nigra, neregula, neoficiala, sekundara ktp.) ekonomio. Pri ĝi preskaŭ nenia statistiko ekzistas malgraŭ la fakto, ke laŭ pluraj eminentaj ekonomiistoj en sufiĉe multaj landoj la valoro de la 'neleĝa ekonomio' atingas 10-20 procentojn de la nacia enspezaro.

## La ĉefa produkto


Ĉi-supre mi listigis kelkajn (ĉiujn listigi tute ne eblus) kriteriojn por komparado de ekonomiaj sistemoj. Tiu ĉi listigo povas doni al la leganto la impreson, ke maleblas kompari diversajn ekonomiajn sistemojn. Tion mi ne dirus. Sed nepras emfazi, ke ne sufiĉas kompari unu aŭ du indikilojn. Ĉiam necesas ege komplekse ekzameni la tutan haveblan indikilaron kaj esplori ĉiujn flankojn de la koncernaj ekonomiaj sistemoj.

Antaŭ ĉio nepras forigi tiun damaĝegan pensmanieron, kiu konsideras ĉu la valoron de la nacia enspezaro por kapo, ĉu la kvanton de iuj materiaj havaĵoj produktitaj (aŭ konsumitaj) kiel ununuran, ekskluzivan kriterion, kiu montras la avantaĝon aŭ malavantaĝon de iu ekonomia sistemo. Tio estas farenda des pli, ĉar ĉi pensmaniero manifestiĝas kaj en la ordo de valoroj de la socio kaj en la ĉiutaga kondutmaniero de la homoj.

La plej bona metodo por kompari ekonomiajn sistemojn estas — laŭ mia propra opinio — tiu, kiu konsideras kiel eble plej da kriterioj kaj samtempe metas la homon en la centron de la komparado. La plej bona ekonomia sistemo estas tiu, kiu pleje certigas por ĉiuj membroj de la socio sanan vivon, akireblon de kiel eble plej vasta kaj profunda klereco (edukiteco, kulturiteco), plenan disvolviĝon de kapabloj kaj inklinoj, la plej multflankan evoluigon de la personeco kaj la plej demokratiajn interhomajn rilatojn. Kvankam estas ege malfacile demonstri ĉion ĉi per statistikaj datumoj, nepras trovi metodojn por mezuri pli ekzakte tiujn ĉi kriteriojn. Ja la ĉefa produkto de la hodiaŭaj ekonomiaj sistemoj devas esti la nova, pli homa homo. ▪



# Kiel distingi inter ekonomiaj sistemoj?



**de Leif Gunnar Karlsson, Svedio**

Parolante pri ekonomiaj sistemoj, la plejmulto de la loĝantoj en industriaj landoj senprokraste diferencigas inter 'komunismo' kaj 'kapitalismo'. Se per tiuj du terminoj ni komprenas, unuakaze, komunan posedon de la produktiloj de difinita lando, kaj duakaze la privatan posedon de tiaj produktiloj, tio ŝajnas memkomprenebla kaj neevitebla diferencigo. La sekva diskuto ĉefe atentas la diferencon inter tiuj du konceptoj, kiel la ĉefan malsamecon inter la diversaj ekonomiaj sistemoj.

Tamen, eĉ nespertulo pri ekonomio povas rimarki, ke la diversaj formoj de la sistemoj portantaj unu el tiuj du nomoj inter si tre malsamas. La komunisma Sovetio ne havas la saman ekonomian sistemon kiel ekzemple Jugoslavio, Ĉinio aŭ Kubo. La kapitalisma Usono ne havas la saman ekonomian sistemon kiel Svedio, Irano aŭ Maroko. Kompreneble tiu ĉi cirkonstanco dependas parte de historiaj kaŭzoj. Iuj landoj havas pli multe da industrio ol la aliaj, aliaj havas pli multe da krudaĵoj, energifontoj aŭ laboristoj. Iuj landoj tra sia tuta historio estis liberaj, dum aliaj suferis sub ekspluatantoj kaj koloniigantoj. Tiuj ĉi naturaj kaj historiaj faktoroj donis al ĉiu lando tute individuajn kondiĉojn por la formado kaj evoluigo de ekonomia sistemo.

Tiu ĉi ekzemplo pri la grandaj malsamecoj inter landoj, kiuj laŭdire apartenas al unu sama sistemo, jam montris, ke distingo inter landaj ekonomiaj sistemoj laŭ difinitaj kriterioj ne estas tre facila afero. Distingado tamen faciligas diskutadon, kaj tial estas neeviteble krei tiucele kriteriojn. Ĉi-rilate estas tre grave ne tiom atenti la terminojn, ke oni neglektas la ofte okulfrapajn malsamecojn.

Ĉiam konsciante pri tiuj ĉi avertoj, oni povas ellabori skemon por oportuna klasifiko de ekonomiaj sistemoj, surbaze de tri esencaj kriterioj.

## Nivelo de industriiĝo

La unua kriterio atentinda estu la industria evolunivelo. Ĝi dependas de multaj faktoroj jam menciitaj. Tie ĉi necesas atentigi pri tio, ke la evolunivelo industria ne per si mem respegulas la vivnivelon de la loĝantaro. La vivnivelo dependas de multaj aliaj faktoroj, ekzemple: justa disdivido de la riĉaĵoj, bonaj laborkondiĉoj, sendanĝera labormedio, liberpensa rajto, kaj tiel plu.

## Posedo de produktiloj

La dua kriterio estu la posedsistemo de la produktiloj. En tiuj landoj normale nomataj de la aliaj 'komunismaj' aŭ 'socialismaj', la industrion kaj ĉiujn laborejojn kaj laborilojn posedas laŭleĝe la tuta popolo komune, kaj la ŝtato klopodas ilin administri por la komuna bono. Laŭ la klasika teorio pri komunismo, ĉiu laboru laŭ sia povo kaj ricevu produktojn laŭ sia bezono. Menciindas, ke ekonomia sistemo tute komunisma en tiu senco ĝis nun neniam ekzistis inter industrilandoj. En landoj kun komuna posedo de la produktiloj, oni ordinare parolas pri 'socialisma ekonomio, en kiu konstruiĝas komunismo'. Ekzistis tamen prakomunismo, t.e., la ekonomia sistemo de la prasocio, kiam la homoj vivis en malgrandaj gentoj, kune laboris, kaj kune konsumis.

En landoj nomataj kapitalismaj, unuopaj personoj povas posedi entreprenojn kaj dungi aliulojn. Ja la plej granda parto de la industrio, fabrikoj, vendejoj ks. apartenas laŭleĝe al privatuloj.

## Grado de planiteco

La tria kriterio distingas inter planaj kaj merkataj ekonomioj. En plana ekonomio oni fabrikas laŭ planoj antaŭe fiksitaj de la ŝtato, kaj vendas varojn por prezoj same fiksitaj. En merkata ekonomio neniu centra organo kunordigas la produktadon. Sendependaj firmaoj fabrikas, surmerkatigas kaj klopodas vendi kontraŭ dezirataj prezoj, sen antaŭscio pri la sukceso. Se la koncerna produkto ne vendiĝas, povas okazi, ke firmao devos mallevi la prezon ĝis iu aĉetos la produkton. Se estas, aliflanke, multaj aĉetemuloj, oni povas altigi la prezon ĝis restas nur unu.

Por proksimigi ĉi tiun priskribon al la ekzistanta mondo, ne ekzistas tute planekonomia lando, en kiu absolute ĉiuj vendoj kaj aĉetoj okazas laŭplane. Eĉ ne la plej sperta soveta planisto scias, ĉu sinjorino Petrovna aĉetos unu aŭ du ovojn por sia kuko. Ne, la planoj reguligas nur la plej gravajn ekonomiajn agadojn: konstruadon de apartamentaroj, disvolvon de nova industrio, malfermon de nova industria regiono ks. La planoj, baze de la proponoj de la entreprenoj, ankaŭ prizorgas la disdonadon de krudaĵoj kaj produktoj al la konsumantaj entreprenoj.

Siavice, ankaŭ tute merkatekonomia socio ne troveblas hodiaŭ. Okazas diversaj interkonsentoj inter ŝtataj aŭtoritatoj kaj entreprenoj, cele al ekonomia stabileco. Ekzemple, firmao promesas liveri al la ŝtato kvanton da petrolo. La ŝtataj aŭtoritatuloj siavice promesas ne rompi la interkonsenton, eĉ se alia firmao ofertos pli malmultekostan liveron. Nia konkludo estu: planekonomio kaj merkatekonomio estas terminoj, kiuj indikas nur la ĉefajn trajtojn de la koncerna ekonomia sistemo.

| | MERKATA EKONOMIO | PLANA EKONOMIO |
|---|---|---|
| **KOMUNA POSEDO DE PRODUKTILOJ (socialismo/komunismo)** | Jugoslavio<br>*Tanzanio* | Soveta Unio<br>*Ĉina PR*<br>Pollando |
| **PRIVATA POSEDO DE PRODUKTILOJ (kapitalismo)** | Usono<br>FR Germanio<br>*Maroko* | Nazia Germanio (1933-1945)<br>Usono kaj Britio dum la Dua Mondmilito, laŭ kelkaj trajtoj |

La ĉi-supra skemo ebligas klasifikon laŭ la tri diskutitaj kriterioj. Evolulandoj, do landoj kun relative malalta nivelo de industriiĝo, estas presitaj kursive. La landnomoj estas nur ekzemplaj. ▪




# Al novaj strukturoj:
## La kooperativa sektoro en kapitalisma lando[1]

**de M.T. Liouville, Francio**

En Francio, multaj homoj kritikas la strukturojn naskitajn de kapitalismo. Ili deziras konstrui socion, kie nura profito ne estus la sola celo de produktantoj, sed kie la ekonomio estus je la servo de la homo. Tiuj opinioj ricevas pli grandan disvastiĝon de post la komenco de la nuntempa ekonomia regreso, kiam kelkaj homoj estis devigataj elpensi novajn strukturojn por problemhavaj entreprenoj. Eble tiu movado estas komenco de nova plivastiĝo de kooperativaj ideoj.

### 1 — Kio estas kooperado? La Pioniroj de Rochdale, 1844

La mondon de kooperado fundamente difinas la respekto de kvin simplaj reguloj, ofte nomataj 'Reguloj de Rochdale': *Libera aliĝo* (principo de la malfermita pordo), *demokratia regado* (principo 'unu homo = unu voĉo'), *disdono de la profito laŭprocente de la uzado de la kooperativaj servoj, limigita interezo al la kapitalo, nedisponebleco de la rezervoj* (je malfondiĝo de kooperativo, la restantaj havaĵoj, post repago al ĉiu kapitalposedanto, povas esti nur transdonitaj al aliaj kooperativoj aŭ organizoj sen profita celo). Tiuj reguloj estis eltiritaj el la spertoj de la unuaj kooperativoj dum la lasta jarcento.

Kiam, en la okcidentaj landoj, industria disvolviĝo ŝanĝis profunde la ekonomian pejzaĝon kaj vivmanieron, tiu nova formo de ekonomia aktiveco, kiu ne konsideris la profiton kiel solan celon, ekaperis paralele kun la unuaj paŝoj de la laborista sindikatismo, kaj ellaboro de socialistaj doktrinoj fare de Fourier, Louis Blanc kaj Proudhon.

La aventuro de la 'pioniroj de Rochdale', fondintoj de unu el la unuaj konsumanto-kooperativoj, fariĝis simbolo kaj legendo por la kooperantoj de la tuta mondo.

La 28an de decembro 1844 en Rochdale, unu el la plej grizaj urboj de Lancashire (Anglio), dudek ok teksistoj kolektis en malantaŭa ĉambro kelkajn modestajn varojn: oleon, lentojn, sekajn pizojn, kandelojn.... Vespere, post la laboro, vendado komenciĝis. Tiun novan komercon oni multe priparolis en la urbo.

Ĉie laboristoj kaj metiistoj serĉis en solidareco solvon al sia mizero. 'La celo de kooperado estas labori por si mem, sed ankaŭ por aliaj. Mi opinias, ke oni malaltigas la rolon de kooperado, uzante ĝin por individuaj celoj, kaj ke ĝia vera rolo estas uziĝi por kolektivaj celoj. Kooperado ne celas individuan saviĝon, sed socian transformiĝon,' skribis Charles Gide, la plej fama teoriisto de la kooperativa movado.

### 2 — Ekonomie grava sektoro

En Francio, kooperativaj ekonomiaj agadoj (bankoj, komercaj entreprenoj, fabrikoj, sed ankaŭ fiŝkaptado, loĝigado) konsistigas ekonomie gravan sektoron. Ĝi tamen ne estas rigardata kiel kohera tuto. La senfina varieco de la organizaĵoj, ilia emo al sendependeco, malebligis ĝis nun grupigi ilin ĉiujn en unu organizaĵo.

La 'Nacia Grupiĝo de Kooperativoj' grupigas la organizaĵojn, kiuj oficiale partoprenas la kooperativan movadon. Inter tiuj, ni povas distingi: **1** la kooperativojn de individuaj entreprenistoj (agrikulturistoj, komercistoj, fiŝkaptistoj), kiuj celas grupigon de servoj: aĉetado, vendado, asekuro kaj kreditoj; **2** la kooperativojn de individuoj por komuna profesia laboro: laboristajn produktokooperativojn; **3** la kooperativojn de individuoj por la plenumo de iliaj 'familiaj' bezonoj: konsumanto-kooperativojn, loĝado-kooperativojn.

La kooperativa banka sektoro financas tiujn tri kategoriojn de kooperativoj. Sur la ekonomia kampo, la kooperativaj agadoj estas aparte gravaj en la sektoroj agrikultura, banka kaj komerca. Ili funkcias ankaŭ, sed pli limigite, en la fiŝkapta, industria kaj loĝada sektoroj.

**Agrikulturo.** Tegmenta organizaĵo ('Confédération nationale de la mutualité, du crédit et de la coopération agricoles') grupigas la agrikulturajn kooperativojn, la agrikulturan asekursistemon kaj la agrikulturan kooperativan bankon ('Crédit agricole'). La agrikulturaj kooperativoj estas grupigitaj en la 'Confédération française de coopération agricole', kiu havas 3 246 730 membrojn[2] el 13 545 kooperativoj, kaj kies jaraj vendoj sumiĝas je 75 miliardoj da frankoj. Ili laborigas 95 000 personojn.

La kooperativa sektoro vendas 22 % de la produktoj de agrikulturaj nutraĵindustrioj. Ĝi produktas 43 % de la laktaj produktaĵoj, 50 % de la porkoviando, 15 % de la bovoviando, 18 % de la ŝafviando, 25 % de la ovoj, 40 % de la kokidaĵoj; ĝi kolektas 69 % de la cerealoj, distribuas 40 % de la fruktoj kaj 50 % de la sterkoj.

**Bankoj.** La banko 'Crédit agricole' estas la unua franca banko, kaj la tria monda banko. Ĝia bilanco, fine de 1975, sumiĝis je 217 miliardoj da frankoj; ĝi posedas 8 000 agentejojn. Ĝi kolektas monon en kaj ekster la agrikultura medio, kaj financas ĉiujn projektojn celantajn plibonigon de la agrikulturo kaj agrikultura vivo.

La banko 'Union du crédit coopératif' grupigas plejparte kooperativajn bankojn, kiuj financas ĉiujn neagrikulturajn kooperativajn sektorojn. Ĝia bilanco sumiĝas je 3,7 miliardoj da frankoj.

---

1 Nur la franca kooperativa sektoro estos studata en tiu ĉi artikolo. Mi tamen volis emfazi, ke ĝi situas en *kapitalisma* lando, ĉar ekzistas ankaŭ kooperativa sektoro en socialismaj landoj, sed kun sufiĉe malsimilaj problemoj. En kapitalisma lando, la kooperativa sektoro estas submetita al konkurenco, kiu karakterizas tiun sistemon; en socialisma lando, ĝi konsistigas la solan neŝtatan ekonomian sektoron.

2 Ĉiuj ciferoj cititaj tie ĉi rilatas al la jaro 1976.

La banko 'Confédération nationale de crédit mutuel' havas similan, sed pli limigitan rolon.

**Komerco.** La 'Fédération nationale des coopératives de consommateurs' grupigas 225 francajn konsumanto-kooperativojn. Ĝi ankaŭ estas asocio, kiu defendas la rajtojn de konsumantoj kaj eldonas dumonatan revuon *Le coopérateur de France* (1,5 milionoj da ekzempleroj). Ĝi cetere kreis kooperativan laboratorion, kiu eldonas informbultenon por la konsumantoj.

La plej konata grupo de konsumanto-kooperativoj (COOP) vendis varojn je sume 2,4 miliardoj da frankoj en 1975. Ĝi laborigas 43 000 personojn.

**Laboristaj produktokooperativoj.** La 'Confédération générale des sociétés coopératives ouvrières de production' ampleksas 576 kooperativojn; ili laborigas 35 000 personojn, el kiuj 15 000 estas kooperantoj. 45% apartenas al la konstrua sektoro, 12% al la pres-sektoro, kaj 22% estas prizorgaj entreprenoj. Ili estas ĝenerale mezgrandaj aŭ malgrandaj entreprenoj.

**Fiŝkaptado.** 100 kompanioj grupigas 25 000 fiŝkaptistojn, kiuj rikoltas 45% de la fiŝoj, kaj vendas ilin por 500 milionoj da frankoj.

**Loĝado.** Kooperativoj 'HLM' grupigas 210 kompaniojn, kaj konstruas 20 000 loĝejojn jare. En tiuj loĝejoj, la loĝantoj fariĝas posedantoj laŭ favora longdaŭra pagosistemo. La 'Cités coopératives' grupigas 300 kompaniojn kaj konstruas 5 000 loĝejojn jare.

### 3 — Kia estonteco por la kooperativa movado?

La franca kooperativa sektoro ne estas homogena. Rifuzo de profito kiel la unua celo de ĉiu agado, kaj aplikado en la entreprenoj de ekonomia demokratio (1 homo = 1 voĉo), ne sukcesis fari el la kooperativa sektoro 'modelon', kiu kapablus anstataŭi la strukturojn de kapitalismo. La kooperativa mondo vivis en fermita cirklo. Ĝi ne kapablis disvastigi sian originalecon. Ĝia ambicio, uzi ekonomion por servi la homon, kaj ne plu la kapitalon, estus devinta rikolti pli larĝan sukceson. Tiu relativa malsukceso ŝuldiĝas al la maljuniĝo de la sistemo, kaj al la troa deziro de multaj kooperantoj protekti la specifecon de sia entrepreno. Ĝi ŝuldiĝas ankaŭ al la manko de teoriistoj, kiuj kapablus relanĉi la entuziasmon, al la manko de kohereco de tro diversenhava mondo. Tiu malfacileco estas aparte sentebla en la laboristaj produktokooperativoj, kiuj tamen proponas respondon al la entreprenreforma bezono.

Tiuj konstatoj ne devas kaŝi la larĝe pozitivajn rezultojn de la kooperativa mondo kaj de ĝiaj realigoj. La profito de kooperativaj entreprenoj estas vaste uzata por financi interesajn sociajn agojn, ĉu instruadon, ĉu libertempajn agadojn, ĉu helpon al la Tria Mondo. Krome, la kooperativa mondo nediskuteble posedas fortojn por elpensi respondojn al la problemoj de la moderna mondo. ▪

Interesitoj pri kooperativismo povas turni sin al la du ĉefaj revuoj tiutemaj: *Revuo de internacia kooperado* (en angla, franca kaj hispana eldonoj; 11 Upper Grosvenor St., London, Britujo W1X 9PA) kaj *Revue d' études coopératives* (nur en la franca; 7 ave. Franco-Russe, F-75007 Paris, Francio).

Serio de Renato Corsetti, Italio: PARTO TRI



# Ĉu lekto por komencantoj?

### 2.1. Komencanto-Esperanto

Por preskaŭ ĉiuj parolantoj Esperanto ne estas gepatra lingvo, kies loka neformala lekto estas aŭtomate kaj komplete lernata dum la unuaj vivojaroj. Ĝi estas fremda lingvo, kies alproprigo povas daŭri ankaŭ tre longan tempon.

Pro tio oni povas distingi, kaj en skribo kaj en parolo, du lingvospecojn, kiuj tamen, kvankam similaj al lektoj, ne estas veraj lektoj. Temas pri la gramatike ĝusta kaj fonetike komprenebla Esperanto, kaj la 'komencanto-Esperanto'.


Ĉi tiu variaĵo havas tre simpligitan gramatikon (neniu akuzativo, nur kelkaj 'tabelvortoj', tre limigita vortaro, nur simplaj verboformoj, ktp.) kaj fonetikan sistemon tre forte influatan de la nacia lingvo de la komencanto. En kelkaj okazoj, ekzemple dum naciaj Esperanto-kongresoj, oni povas aŭdi verajn piĝinajn lingvojn, tio estas: miksaĵoj de nacia lingvo kaj Esperanto. Ĉiukaze, kiel mi jam diris, ne temas pri vera lekto, ĉar ĝi ne estas stabila aĵo, ĝi malaperas iom post iom se la parolanto spertiĝas, lernas plie, ktp.

### 2.2. Esperanto estas unu-lekta

Konklude, se preteratenti la komencanto-Esperanton, nuntempe en Esperanto ne ekzistas apartaj lektoj. Ĉu ili devus ekzisti? Ĉu manko de ili estas io malbona? Mi opinias ke ne. La celo de Esperanto estas tute klara. Ĝi celas esti internacia, interkomunika lingvo, kaj por tio ĝi bezonas nur unu lekton.

Kompreneble poetoj, romanverkistoj, teatro-verkistoj en kelkaj okazoj estas en embarasa situacio. Mi bedaŭras pro ili, tamen malmulto estas farebla (kaj farinda en la nuna momento). Kiam temas pri originalaj verkoj, niaj verkistoj de tempo al tempo trovas solvojn, kiuj samtempe respektas la dek ses regulojn kaj montr(et)as lektajn malsamecojn. Kiam temas pri tradukoj en kiuj, kiel ni vidos en la ĉi-postaj ekzemploj, lektaj malsamecoj estas tre gravaj, oni devas konscii ke parto de la 'informoj', kiujn legado de la originala teksto peras al leganto, estas perdataj.

Provoj ellabori 'arkaikan' Esperanto-lekton, per aldono de pli komplika finaĵsistemo, ŝajnas al mi kuriozaj amuzaĵoj, kiuj estas sendanĝeraj se oni rigardas ilin kiel




* Senpage vizitebla lunde, merkrede kaj vendrede: 9-15.30 h. Aliro sub la granda kupolo de "Hofburg" ĉe Michaelerplatz (vidalvide de la imperiestraj ĉambroj). La Muzeo troviĝas en la 3a etaĝo.

Desegnis: Stella de Caspary, Norvegio. Desegnis la mankajn partojn: Huibert den Draak, Nederlando. Verkis: ✍.





*Gáspár HELTAI*

LA ENFERMÍTA REĜEDZÍNO


simplajn amuzaĵojn. Per la sama procedo oni povus produkti ankaŭ kamparanan Esperanton (tio estas la Esperanto-lekto, kiun parolus esperantlingvaj kamparanoj, se ili ekzistus), kaj multajn aliajn lektojn.


Ni konsolu nin per la konsidero ke ankaŭ traduko inter naciaj lingvoj perdigas amason da informoj, ĉar la lektoj de malsamaj lingvoj ne estas ĉiam simetriaj kaj meĥanike interŝanĝeblaj. Se vi devus traduki en la italan poemon originale verkitan en la svisgermana lekto, en kiun specon de itala lingvo vi ĝin tradukus? Ĉu havus sencon traduki ĝin en la italan lekton de la lombardiaj kamparanoj? Se vi devus traduki francan tekston de la 17a jarcento en la svedan, kian svedan vi uzus? ∎

**La lasta ero en ĉi tiu serio koncernos provojn traduki poemojn verkitajn en italiaj lektoj en Esperanton.**

**Arkaika Esperanto — ĉu nur ludo? Se jes, jen du el la pli notindaj ludantoj — sube, Manuel Halvelik (Belgio), kiu verkis tutan manlibron pri la temo, kaj maldekstre, Ottó Haszpra (Hungario), kiu uzis alian sistemon por sia traduko de novelo el la 16a jarcento ('La enfermíta reĝedzíno', *Hungara Vivo* 1977: 5).**







# Inter tradicio kaj moderno:
## Junularo debatas en Nairobi

de Ian Tarrant, Kenjo

*La junulara fako de Unesko aranĝas serion de regionaj junularaj kunvenoj en diversaj mondpartoj. Fine de 1979, Ian Tarrant, nome de TEJO, observis la afrikan kunvenon, en Nairobi.*

Je la sesa etaĝo de impona konstruaĵo meze de Nairobi estas la Regiona Oficejo de Unesko pri Scienco kaj Teknologio en Afriko. Tie kunvenis junuloj (iuj ja malpli junaj ol aliaj) de 21 ŝtatoj de Afriko sude de Saharo. Kelkaj estis reprezentantoj de junularaj organizoj, kelkaj estis universitataj spertuloj, sed duono estis registaranoj aŭ membroj de kvazaŭ-registaraj instancoj. Mi troviĝis en grupo de observantoj. Eŭropanoj kaj virinoj estis rimarkende malmultaj. Kontraste al eŭropaj junularaj kunvenoj, la partoprenantoj plejparte digne vestiĝis per kompletoj kaj kravatoj. Unesko pagis al ĉiu partoprenanto (ne observanto) vivkostojn: ĉiutage monsumon kiu egalas al minimuman monatan salajron fiksitan de la kenja registaro. Laborlingvoj estis angla kaj franca, preskaŭ egale uzataj. Oni diskutis sufiĉe vigle, kaj mi bedaŭris ke mia samtempa lingvokurso malebligis al mi observi ĉion. Malgraŭ tio, pere de la raporto pri la kunveno, kaj miaj propraj (ankoraŭ magraj) spertoj pri Afriko, mi povas iom rakonti.

Oni diskutis du temojn: unue pri la pozicio de la afrika junularo inter tradicio kaj 'moderno'; due pri la eblecoj krei laboron por la senlaboraj gejunuloj. La dua temo estis tre specifa kaj detala, kaj ne kondukis al rekomendaro aparte interesa por neafrikanoj. Aliflanke, la unua temo ebligis ĝeneralajn konstatojn, ne tute novajn, tamen interesajn kaj esprimitajn en rekomendaro sufiĉe saĝa kaj aŭtoritata por iel efiki je la decidofarantoj. Tiu rekomendaro estas bedaŭrinde longa; nur kelkaj alineoj citiĝas tie ĉi.

Estis interese rimarki ke malgraŭ la diseco de la hejmoj de la partoprenantoj, iliaj spertoj pri tradicio kaj moderno ofte similis. Oni ne imagu ke ĉiuj popoloj sude de Saharo havas unu komunan kulturon aŭ socian sistemon; tiel ne estas eĉ ene de unu ŝtato, kiel Kenjo. Sed ĉu el okcidento, sudo aŭ oriento, la homoj kune aprecis la tutafrikajn aspektojn de la vivoj tradiciaj kaj modernaj.

Mi skizu mallonge la koncernajn problemojn.

### Edukado – malamiko de tradicio

La misiistoj fondis plurajn lernejojn laŭ eŭropa modelo (ili ne konis alian). Indiĝenoj imitis kaj fondis pliajn. Studi en lernejo fariĝis prestiĝe – ne nur por la lernanto, sed ankaŭ por ties familio. Familioj kaj tutaj komunumoj multon oferas por ke infanoj edukiĝu laŭ eŭropa maniero. Sed por infano, lernejo estas nova eksterfamilia mondo, kie oni parolas alia(j)n lingvo(j)n pri pluraj temoj, kiuj plejparte ne rilatas la tradician kamparan vivon.

Infanoj, kiuj intelekte brilas, aŭ kies familio sufiĉe riĉas, progresas de loka elementa lernejo al mezlernejo, kutime pensiona. Ofte kreiĝas fendo kultura kaj aŭtoritata inter lernanto kaj familio. Klasĉambre la lernanto ekkonas la vastan mondon, sed ne lernas respekti la propran hejmon; lernas pri gravo de ŝtato, sed ne pri gravo de familio kaj tribo; lernas submetiĝi al libroj kaj instruistoj, sed ne plu al gepatroj kaj geavoj. Lerniĝas amaso da aferoj, kiuj utilos nur se sekvos la mezlernejon altlernejo, salajrata posteno ĉefurba aŭ io simila. Fakte, la plimulto reiras al la familiaj bienetoj por fari la tradiciajn laborojn, sen la tradicia kontento pri tio. El ili, iuj forkuras al la urboj por tie serĉi pagatan laboron, kaj iel sperti mem la netradician mondon pri kiu ili lernis lerneje. Sed la laboreblecoj ne sufiĉas, kaj la vivkondiĉoj estas ofte mizeraj: la plej mallogaj partoj de Nairobi situas nur kvar kilometrojn for de tiu impona konstruaĵo en la mezo, kie ni konferencis. Per krimo multaj vivtenas sin; pro krimo la aliaj vivas sen sekuro.

Kompreneble, estas ankaŭ tiuj, kiuj 'sukcesis,' kaj loĝas en la urbo kun sekura posteno kaj kontentiga salajro, kaj kies vivmaniero estas eŭropana. Sed laŭ mi, almenaŭ en Kenjo, la vere sukcesaj homoj estas tiuj bienuloj, kiuj kreskigas ne nur proprajn manĝaĵojn, sed ankaŭ ion profite forvendeblan; tiuj diligentaj metiistoj kaj etkomercistoj, kiuj servas la kamparanojn; tiuj instruistoj, kiuj trafas postenon apud la familia hejmo. Ili, kaj kelkaj aliaj, ĝuas la tradiciajn fortojn de familio kaj tribo, sed ankaŭ povas sperti la materiajn kaj intelektajn benojn de evoluigo.

Ĉion ĉi diskutis la kunveno, sen malespero, eĉ optimisme, kaj serĉis solvojn.

### Ĉu ŝanĝoj por virinoj?

Unu aspekton de la tradicia vivo oni ne volis reteni: la socian pozicion de virinoj. Tamen, oni neglektis eĉ sugesti kiajn rimedojn oni uzu por tion ŝanĝi. Mi konfesu dubon pri la sincero de ĉiuj partoprenantoj tiurilate. Eble mia dubo estas maljusta, sed mi jam renkontis surprize fortan opozicion kontraŭ la liberiĝo de virinoj en Afriko. Tie ĉi, eĉ pli ol en Eŭropo, ili devos mem pruvi siajn kapablojn kaj praktiki siajn jurajn rajtojn.

La kunveno neniel solvis ĉion. Laŭ ĝi, la hodiaŭa Afriko eltrovu novan socian kaj ekonomian strukturon por kontentigi ĉiujn tavolojn de la loĝantaro, kaj novan kulturon, laŭ kiu la roloj de ĉiuj, precipe de gejunuloj kaj virinoj, estu redifinitaj. Ŝajne temas pri ia socia inĝenierado, kian oni ne provis alikontinente. Tamen, la kunveno sufiĉe kohere pritaksis la problemojn kaj signis vojojn antaŭen. Ni esperu, ke oni laŭiros tiujn vojojn antaŭ ol la nunaj degenerado de la socio kaj kresko de la loĝantaro havos katastrofajn sekvojn kaj por Afriko kaj por la mondo. ▪

*Afrika junularo inter tradicio kaj moderno: la kunveno verkis longan rekomendaron pri la temo. Jen iuj el la rekomendoj kaj konstatoj en ĝi.*

## Bazaj principoj

Ĉiu juna viro aŭ virino, samkiel ĉiu homo, havu la neforigeblan rajton:

- **a** profiti el edukado kiu kaj strukture kaj enhave respondas al la specifaj valoroj kaj la evoluigaj bezonoj de ties socio;
- **b** profiti dum kaj laboraj kaj liberaj horoj el la riĉo de sia kultura heredaĵo...kaj plene partopreni la aplikon kaj/aŭ adapton de tradiciaj kulturaj valoroj por la bezonoj de evoluigo;
- **c** kontribui intelekte, socie kaj politike al la difino de 'moderno' en sia kultura medio;
- **ĉ** asociiĝi kun aliaj gejunuloj en lokaj kaj naciaj junularaj organizoj, kiuj spegulas la valorojn de sia socio kaj kiuj ebligas al junularo ludi aktivan, efikan kaj respondecan rolon je la konstruo de nova socio.

## Sintezo

La afrika junularo neniel frontas situacion, kiu necesigas krudan decidon oferi sian kulturan tradicion pro ofte fremdaj konceptoj de 'moderno', sed devas partopreni la kreon de estontaj socioj, kiuj estas ekonomie kaj socie evoluintaj kaj kiuj tenas la valorojn kaj artojn de la afrika pasinteco. Tiu ĉi pasinteco devas esti rekaptita, plene aprecita, zorge taksita kaj aplikita al konstruo de unike afrika moderno.

Ĉiu nacio elektu el siaj tradicioj kaj hodiaŭaj ambicioj propran vojon por evoluo. Junularo, starante je la fokuso inter pasinteco kaj estonteco, havas la rajton kaj respondecon plene partopreni tiun ĉi procezon interparolan kaj novenkondukan. Tradicio kaj moderno, neniel kontraŭaj tendencoj aŭ konceptoj, kunfandiĝis en la realo de afrika kulturo kaj socio. Ili kompletigas unu la alian kaj postulas kreivon de la planistoj pri evoluigo.

## Difinoj

...Oni ofte kredas moderno fremdajn modelojn de ekonomia kaj socia evoluigo. Ni kredas, ke moderno devus esti redifinita kaj realigita kiel aparte afrika formo de socia, ekonomia kaj kultura progreso.

Oni ofte miskomprenas tradicion kiel sopiron je perdita pasinteco, kaj eĉ kiel senkulpigon pri subpremaj hierarkiaj sociaj strukturoj. Ni kredas, ke ĝi estas fleksa dinamika fonto de kultura karaktero.

Afrika evoluigo, inkluzive de la kresko de junularaj organizoj kaj agadoj, estu ne nur ricevanto de modeloj kaj praktikoj de aliaj kulturoj. Afriko, je sia kreo de propra formo evoluiga, povas multon proponi al la cetera mondo.

## Realoj

Ni ne plu povas ignori:


- **a** la efikon de la afrika familio ... je la formiĝo, edukiĝo kaj direktiĝo de gejunuloj;
- **b** la ekziston de lingva kaj religia plureco ene de afrikaj nacioj, kaj sekve inter ties gejunuloj;
- **c** la efikon de urba pliiĝo je kampara junularo kaj ties forkuro al la urboj;
- **ĉ** la eventuale disrompan rolon de importitaj kulturaj mesaĝoj kaj formoj — kino, muziko, vestaro kaj eĉ porprodukta teknologio — je afrika junularo.

Ni demandas, ĉu eblas akcepti kulturan sendirektiĝon, socian senesperon kaj eĉ junularan deliktemon kiel koston de netrapensitaj formoj de t.n. progreso. Forŝirataj estas la vojindikiloj de afrikaj moralo kaj konduto; kaj apenaŭ vidiĝas anstataŭaĵoj.

## Edukado

La hodiaŭa afrika lernejo estas neniel afrika. Trudita de la kolonia sistemo, ĝi anstataŭigas la ĝeneralan kaj familian edukojn ... per tute raciismaj instruplano kaj instrumetodo.

La lerneja instruisto devas denove sin ŝarĝi per la tradicia rolo de konsilanto, inspiranto kaj gvidanto de gejunuloj. Nur tiel oni povas ponti la timigan abismon inter familio kaj lernejo; nur tiel oni povas inversigi la draman tendencon je eksiĝo antaŭ finstudo; nur tiel povas evoluigo fariĝi socia projekto ligita al la bezonoj de la infano kaj la junulo. Alvokiĝo kaj lernado ambaŭ estas partoj



de edukiĝo. La muro konstruita de 'modernaj' lernejoj inter cerbaj kaj korpaj laboroj estas baro je la vojo al progreso.

## Junularaj organizoj

...Afrikaj junularaj organizoj, same kiel la eduksistemo, ofte spegulas fremdajn ideojn pri strukturo kaj funkcio. Kutime ili enplektas nur la urban edukitan junularon. Ili estu reelpensitaj kaj rekonstruitaj de la junularo mem, de la malsupro (la vilaĝa nivelo) supren, kaj ne de la politika centro. La ŝtato provizu la necesajn monrimedojn kaj subtenon, sed la junularo kreu kaj gvidu la proprajn organizojn....

## Popola festo

- **a** La popola festo, enplektante tutajn komunumojn aŭ specifajn aĝgrupojn, estas afrika tradicio kiu estas demokratia, egaleca, integriga kaj ĝoja. Ĝi celebras la tradiciajn sportojn, konkursojn, kantojn, dancojn kaj teatron, kiuj kunligas individuojn en komunumon, kaj komunumojn en nacion. Ĝi mortas.
- **b** La revivigo de la popola festo, per esploroj kaj agado fare de junularaj organizoj, registaroj kaj Unesko, povus esti gravega ekzemplo pri la eblo ligi tradicion al mobilizo de ĉiuj sociaj grupoj kaj generacioj al evoluigaj projektoj kaj al nacikonstruo.
- **c** Anstataŭigante la senĝojajn instituciajn formojn de fremdaj kulturoj per la popola festo, oni povas montri, ke tradicio kaj moderno subtenas unu la alian. Tradiciaj ludoj, sportoj, teatro kaj danco povas esti retrovataj kaj aplikataj al pluraj utilaj celoj:
  1. reemfazo kaj nova aprezo de kulturaj radikoj inter gejunuloj;
  2. revivigo de ĝuo en la kampara vivo kaj ĝiaj ritmoj de ludo kaj laboro;
  3. revivigo de solidareco por disvastigi sociajn, politikajn kaj edukajn (foje ideologiajn) temojn, inter plej vastan popolamason, kaj inviton partopreni je nacia evoluigo;
  4. la ebleco krei regionajn junularajn festojn, en kiuj ĉiu kulturo, lingvo kaj politika sistemo sin esprimas dum malfermita neformala dialogo kun aliaj afrikaj movadoj.

## Estonteco

La ŝlosila rimarko por ĉiaj estontaj studoj kaj agadoj estu, ke afrikaj tradicioj, samkiel tiuj de iu ajn alia kulturo, staras egalaj el la valoroj de aliaj socioj, kaj ke ili ne cedu al akstera influo. La kosto de progreso, kiel tiu pagita en ĉiuj kulturoj, eble estos anstataŭigo de iuj valoroj per aliaj. Sed la radiko kaj la branĉo devas kreski kaj adaptiĝi, ne velki kaj morti.

Resume, Afriko, kun ekonomia, socia kaj kultura historioj profunde influitaj de la sperto koloniisma, postulas ke ĝia junularo konstruu edukajn, sociajn kaj organizajn formojn, kiuj radikas en ĝiaj tradiciaj kulturaj situacioj kaj, samtempe, direktiĝas al la unika estonteco de ĝia kontinento.

# *Kien iras la Movado?*

SEMINARIO DE TEJO EN LA EŬROPA JUNULARA CENTRO EN STRASBURGO

## Internacia komunikado: aplikado de Esperanto

Kontribuis
C. Piron
A. Butler
C. Gacond
B. Kasini
S. MacGill
I. Tarrant
C. Darbellay
R. Corsetti




*48p., ilus., DIN A5. Prezo: 5,10 gld. plus sendokostoj 10%. Mendu ĉe UEA aŭ ĉe TEJO-Butiko, C.P. 213, I-56100 Pisa, Italujo (pĉk. 22/21368 Livorno je la nomo B. Casini, Ghezzano/Pisa).*

# Ĉu vi parolas tendare?




3a eldono
ĵus aperis!
broŝurita
ilustrita
96 paĝoj
21x15cm.

de Renato Corsetti kaj Mauro La Torre. Rektametoda lernolibro de TEJO por kursoj en labortendaroj. Prezo: 5,10 (por Nederlando 5,30) gld. plus sendokostoj 10%. Triona rabato ekde 3 ekz. ĉe UEA. Aĉetebla ankaŭ ĉe TEJO-butiko.

NOVA PERIODAĴO ĈIUMONATA
por ĉiu serioza esperantisto....




prezentas
INFORMADON
ANALIZADON
KLARIGADON
pri granda, grava lando.

Ne nur por fakuloj, sed por ĉiu kiun interesas mondaj aferoj.
Jarabono: US$8,– (12 numeroj); provekzemplero kontraŭ unu irpk.
Adreso: 7008 Millwood Road, Bethesda, Maryland 20034, Usono.
Abonebla ankaŭ ĉe la Libroservo de UEA: 18,00 gld. jare.

— ekspedata aere —